



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Decembro 2016 n-ro: 12



## Merhaba !

Elinizdeki onikinci sayımızla 2016 yılını uğurluyoruz. Bu sayımızda da birbirinden ilginç yazılarla karşınızdayız.

Bu ayın en önemli olayı UEA tüzüğündeki bazı değişikliklerin oylanması. Bu değişikliklerin büyük kısmı TEJO ile UEA 'nın birbirlerinden ayrılması. Bu konuda birbiri ile zıt düşünceler sözkonusu. UEA üyesi olanlarımız seçim kağıdınızı çoktan doldurup göndermişsinizdir. Dergimizde sizlere UEA'nın bu değişiklikleri konuda bir miktar bilgi vermeyi çalıştık.

İlginç yazılardan bir kaç şunlar:

- 1,001 Gece Masallarının giriş kısmının bir bölümü
- "Krokodili" fiili kökünün nereden geldiği
- Esperanto kelimelerinin nereden geldiği

Bu sayımızla birlikte geçmiş makaleleri daha kolay araştırabilmek için sizler 2016 yılının tüm sayılarını içeren bir index bröşür gönderiyoruz.

Hepinize mutlu bir yeni yıl dileriz.

*Hepinize iyi okumalar...*

## Saluton !

Pere de ĉi tiu dekdua numero de nia revueto ni adiaŭas la jaron 2016. ankæŭ en ĉi tiu numero ni aperigas tre interesajn artikolojn por vi.

La plej grava afero de la monato decembro estas la voĉdonado organizanta de UEA. La plej granda parto de ĉi tiu voĉdoao estas pri la ŝanĝo de la statuto de UEA, kaj la apartigo de UEA kaj TEJO. Estas kontaŭantaj pensadoj pri tiu temo. Tiuj el vi kiuj estas membroj de UEA kaj ricevis la voĉdonilon eble jam plenigis kaj resendis ĝin. En nia revueto ni provis informi vin pri tiuj ŝanĝoj de UEA.

Kelkaj el la plej interesaj verkaĵoj estas:


- Parto de la enkonduko de 1,001 Noktoj
- Origino de la radiko "krokodili"
- Origino de esperantaj vortoj

Kune kun ĉi tiu numero ni disdonas ankaŭ al vi folieton kun la tutaj indeksoj de la 12 numeroj en la jaro 2016 por, ke vi faĉile trovu tion kion vi serĉas.

Ni bondeziras bonan novjaron al ĉiu.

*Bonan legadon al ĉiu...*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
Pri disiĝo de TEJO kaj UEA	3
Mil kaj Unu Noktoj	4
Pri revuo Monato	5
Hajkoj de Elena Popova	6
Tuŝo de animo (poemo)	6
Vordonisi kaŝita sub akvo (poemo el epopeo)	6
Ŝerĉoj	7
Kurĉvort-enigmo	7
Ĉu vi legas la revuon "Esperanto"	8
Hundoj komprenas ĉiun vorton	9
Mallonga historio de filozofio(11)	10
La junaj Detektivoj (7)	11
Pri bulteno libera folio	13
Malnovaj grekaj mitoj: Edipo kaj Antigona (2)	14
Origino de la radiko "krokodili"	17
Dao de Jing (5)	18
Kio estas ILEI	19
Unu taso de tejo superas armilojn	20
Flugado de pavoj	22
Kuiru kun mi	23
Pri Eŭropa Bulteno	23
Origino de Esperantaj vortoj	24
Esperanto Kurso (12)	25
Malfermo	28
Pri Esperanto revuo	28

## Kursoj




1) Kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. La kurso komencis sub la gvidado de Murat Ŭzdizdar. Estas kvar lernantoj, unu komencanto, unu progresanto, kaj du instruistoj (de la hispana kaj franca lingvoj) kiujsekvas la kurson

2) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto. Pro manko de interesiĝantoj momente ne estas kurso.

3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo. Utku Gürdal la gvidanto okupiĝas pri sia disertacio, kaj momente estas neniu interesiĝanto por la kurso.

### BAZA VERKO PRI NIA HISTORIO

## ULRICH LINS NOVA LA DANĜERA LINGVO



Plene reviziita eldono de la fama verko pri persekutoj kontraŭ la Esperanto-movado, precipe en la Hitlera Germanio kaj Stalina Soveta Unio. Ilustrita.

**€ 18,00**

LA DANĜERA LINGVO. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2016. 375 + 24 paĝoj. 19 cm. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

## ANONCO !



Ni bezonas tradukantojn por la projekto traduki la famajn arabajn rakontojn "Mil kaj Unu Noktoj" (el la angla en Esperanto). Tiuj kiuj pretas helpi bonvolu kontakti nin. La laboro traduki unu rakonton per semajno ne estos laboro pli longa ol kelkaj horoj.

[renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)  
[vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)



## Ni atendas leterojn de geamikoj



**Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!**

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝerĉoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)



## Esperanto-Sumoo



La novembra Esperanto-Sumoo okazos ekde la 13-a ĝis la 27-a de novembro 2016.  
**NE FORGESU ALIĜI !**

Jen ligilo por la retejo de la Esperanto-Sumoo:

**http:**

[//www.esperantosumoo.strefa.pl/index.html](http://www.esperantosumoo.strefa.pl/index.html)

Jen ligilo por la facebook-grupo Esperanto-Sumoo:

**https:**

[//eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

## UEA kaj TEJO



**tejo**  
JUNE KAJ KUNE

### Ĝenerala Voĉdono pri la Statuto de UEA progresas

N-ro 640 (2016-10-15)

Unu monaton post la ekigo de la Ĝenerala Voĉdono pri la Statuto de UEA, individuaj membroj kaj aliĝintaj landaj kaj fakaj asocioj tra la mondo komencis diskuti kaj voĉdoni pri la proponitaj ŝanĝoj.

Jam alvenadas voĉdoniloj el plej diversaj landoj, konfirmas Veronika Poór, Ĝenerala Direktoro de UEA. Ni ĝojas vidi la reagojn, ĉar por sukcesa ŝanĝo pli ol duono de la membroj devas voĉdoni jese. Ni

fidus la subtenon kaj partoprenon de la membroj, landaj kaj fakaj asocioj por la sukcesa voĉdono.

La proponitaj ŝanĝoj en la Statuto estis diskutitaj kaj aprobitaj de la Komitato de UEA dum la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Ili traktas diversajn temojn, interalie la rilatojn inter UEA kaj ĝia junulara sekcio TEJO, kaj la utiligon de Interreto por fari voĉdonojn kaj decidojn.

Legu pli ĉe:

**<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2016/Gxenerala-Vocxdono-pri-la-Statuto-de-UEA-progresas>**

## M.Boris Mandirola parolas pri la disĝo de TEJO kaj UEA

Estas malfacile respondi en Facebook-komento pri tiom ampleksa temo. Simple estas pli konvene al TEJO registriĝi kiel memstara organizo kaj aliflanke resti junulara sekcio de UEA.

Pli detale mi provas ĉi tie klarigi (mi konsilas legadon de mia artikolo en februara revuo Esperanto)... TEJO bezonas esti jure memstara organizo, por subvencipeti necesas esti registritaj tra UEA estus ege malpli altaj eblecoj ol ĝi havas subvencipetante propranome kiel junulara organizo. TEJO registriĝis jam antaŭ kelkaj jaroj kiel organizo kun limigita jura personeco, tio estas iom ambigua afero sed fine la eŭropaj instancoj agnoskis ke tio signifas ke TEJO jam jure memstaras kaj nederlanda notario rimarkigis ke tio estas malkongrua kun la Statuto de UEA. Krome la antaŭa Regularo preskribis ke TEJO faru kontraktojn nur nome de UEA kaj tio ne estis aplikebla ĉar TEJO subvencipetis propranome. Kiel ajn ni volas ke TEJO havu plenan juran personecon por

definitive solvi tiajn problemojn.

Krome ĝis nun UEA havis la rajton interveni kaj nuligi decidojn de TEJO aŭ vetoi Statutŝanĝoj. Tamen por eksteraj rilatoj (TEJO nun multe aktivis eksteren), nun necesas ke junulara organizo estu aŭtonomia kaj ne submetita al ekstera instanco en siaj decidoj. Sed ankaŭ por ke TEJO povu libere decidi sen interveneblo de UEA, necesas ke TEJO mem respondecu pri siaj agadoj jure kaj finance.

Kaŝi al la ekstera mondo la jura stato de TEJO estas tre danĝera afero, ja atenta kontrolo povus facile detrui jar(dek)ojn da laboro. Ni prefere simple respektu la regulojn de la ekstera mondo kaj ni adaptu niajn internajn regulojn al ĝi, por ke niaj organizoj povu prosperi kaj agadi fruktodone laŭ la nunaj cirkonstancoj.

Tio tamen ne estas rompo inter TEJO kaj UEA - la procezo estis plenumita en konstanta konkordo kun la UEA-Estraro. Krome TEJO

restas la junulara sekcio de UEA, la junaj aligitaj kaj individuaj membroj de UEA pluestos la aligitaj kaj individuaj membroj de TEJO, la du organizoj daŭre sidejos en la CO, la CO daŭre prizorgos la administradon de TEJO kaj la estraroj de TEJO kaj UEA daŭre havos observanton ĉe la alia.

Vi povas pli bone kompreni la novajn rilatojn inter TEJO kaj UEA tra la Statuto de TEJO:

**[http://www.uea.org/teko/komitat\\_aj/Statuto\\_de\\_TEJO\\_-\\_2016-07-20.pdf](http://www.uea.org/teko/komitat_aj/Statuto_de_TEJO_-_2016-07-20.pdf)**

kaj la Regularo pri Kunlaboro:  
**[http://www.uea.org/teko/komitat\\_aj/Regularo\\_pri\\_Kunlaboro\\_Inter\\_TEJO\\_kaj\\_UEA.pdf](http://www.uea.org/teko/komitat_aj/Regularo_pri_Kunlaboro_Inter_TEJO_kaj_UEA.pdf)**

Ambaŭ dokumentoj estis aprobitaj kun vasta plejmulto de ambaŭ la Komitato kaj la rilatoj ŝanĝeblas nur laŭ konsento de ambaŭ la organizoj.

Fonto:

**<https://web.facebook.com/groups/Universala.Esperanto.Asocio/permalink/709760715856581/>**

## Mil kaj Unu Noktoj



Inter la rakontoj de antaŭaj popoloj estas rakonto pri tio, ke en antaŭaj tempoj en la insuloj de Hindujo kaj Ĉinujo estis sasana (1) reĝo, mastro de armeoj, gardistoj, servistoj kaj dungitoj, kiu havis du filojn unu pli aĝan kaj unu pli junan. Kvankam

ambaŭ estis lertegaj rajdantoj la plej aĝa estis pli lerta ol sia frato. Li regis la landojn kaj traktis siajn subulojn juste kaj ĝuis la bonan volon de ili ĉiuj. Lia nomo estis Reĝo(2) Ŝahrijar, dum lia juna frato, kiu regis la persan Samarkandon, estis nomata Reĝo Zaman. Dum 10 jaroj ili ambaŭ regadis juste kaj ĝuis plaĉan kaj senproblemajn vivojn, ĝis kiam Reĝo Ŝahrijar sentis deziron vidi Reĝon Zaman kaj sendis sian veziron (3) por venigi lin. "Aŭdo estas obeo" diris la ministro kaj, save vojaĝinte al Reĝo Zaman, li portis al li la salutojn kaj diris al li, ke lia frato atendis viziton de li.



La reĝo Zaman konsentis iri kaj ekfaris siajn preparojn por la vojaĝo. Li igis munti siajn tendojn ekster sia urbo kune kun siaj kameloj, muloj, servistoj kaj gardistoj, dum lia propra veziro estis lasita kiel reganto de la landoj. Poste li mem eliris el la urbo por iri al la lando de sia frato, sed je noktomezo li pensis pri io, kion li forgesis, kaj li reiris al la palaco. Kiam li eniris sian ĉambron, li malkovris sian edzinon en la lito kun nigra sklavo. La mondo iĝis nigra por li, kaj li diris al si mem: "Se ĉi tio estas tio, kio okazas eĉ antaŭ ol mi forlasis la urbon, kion ĉi tiu damninda virino faros, se mi pasigos tempon fore ĉe mia frato?" Kaj tiel li elteris sian glavon kaj frapis ilin, mortigante ambaŭ sian edzinon kaj ŝian amanton, kiuj kuŝis kune, antaŭ ol reiri kaj ordoni al siaj akompanantoj ekiri.

Kiam li alproksimiĝis al la urbo de Reĝo Ŝahrijar, li antaŭsendis mesaĝistojn por doni la bonan novaĵon pri lia alveno kaj Ŝahrijar elvenis por renkonti lin kaj salutis lin tre ĝue. La urbo estis ornamita per dekoraĵoj kaj Ŝahrijar sidadis feliĉe parolante kun li, sed la Reĝo Zaman memoris tion, kion la edzino faris kaj, venkita de malĝojo, iĝis pala kaj donis signojn de malsano. Lia frato pensis, ke tio ŝuldiĝas al la fakto, ke li devis lasi sian regnon, kaj li ne faris demandojn al li ĝis post kelkaj tagoj, kiam li menciis tiujn simptomojn al Reĝo Zaman, kiu diris: "Miaj sentoj estas vunditaj." sed li ne

klarigis tion, kio okazis pri lia edzino. Por refeliĉigi lin Ŝahrijar invitis lin akompani lin dum ĉasado., sed li rifuzis kaj Ŝahrijar ekiris sole.

En la reĝa palaco estis fenestroj, kiuj superigardis al la ĝardenoj de Ŝahrijar, kaj dum la reĝo Zaman estis rigardanta malfermiĝis pordo kaj jen eliris dudek sklavinoj kaj dudek sklavoj kaj en la mezo de ili estis la tre bela edzino de Ŝahrijar. Ili paŝis al iu fontano, kie ili deprenis siajn vestojn kaj la virinoj sidis kun la viroj. "Mashud" la reĝino vokis, je kio nigra sklavo venis al ŝi. Kaj ĉirkaŭbrakuminte unu la alian, ili kuŝis kune, dum la sklavoj kuŝis kun la sklavinoj kaj ili pasigis sian tempon per kisado, ĉirkaŭbrakado, fikado kaj trinkado de vino ĝis la fino de la tago.

Kiam la reĝo Zaman vidis tion, li diris al si mem, ke tio, kion li suferis, estis malpli grava. Lia angoro pro ĵaluzo finiĝis, kaj, konvinkinte sin, ke lia propra malbonŝanco estas pli malgrava ol ĉi tiu, li plu manĝis kaj trinkis, tiel ke, kiam Ŝahrijar revenis kaj la du fratoj intersalutis, Ŝahrijar vidis ke la koloroj de la reĝo Zaman revenis, ke lia vizaĝo estas rozkolora kaj ke post la antaŭa perdo de apetito li manĝas normale. "Vi estis pala, frato" diris Ŝahrijar, "sed nun vi rehavis viajn kolorojn. Do, rakontu al mi pri tio." Mi rakontos al vi, kial mi perdis mian koloron" la frato respondis "sed ne premu min rakonti, kial mi rehavis ĝin." "Diru al mi unue kiel vi perdis vian koloron kaj kiel vi fariĝis tiel malforta." Ŝahrijar demandis, kaj lia frato klarigis. Kiam vi sendis vian viziron por inviti min viziti vin, mi pretiĝis kaj jam iris ekster la urbon, kiam mi memoris pri juvelo, kiun mi intencis donaci al vi, kaj kiun mi estis forgesinta en la palaco. Mi reiris tien kaj trovis nigran sklavon, kiu dormis en mia lito kun mia edzino. Mortiginte ilin ambaŭ, mi ekvenis al vi. Mi estis plene koncernita pri tiu afero, kaj pro tio mi iĝis pala kaj malsaneca, sed ne petu min diri, kiel mi resaniĝis. Ŝahrijar, tamen, premis lin fari tion, kaj en la fino Ŝah Zaman rakontis al li ĉion, kion li estis vidinta.



"Mi volas vidi tion per miaj okuloj" diris Ŝahrijar. Tiam Ŝah Zaman sugestis, ke li ŝajnu, ke li volas iri ĉasi

ree, kaj ke poste li kaŝu sin kun li por testi la veron per siaj propraj okuloj.' Ŝahrijar tuj anoncis, ke li foriras por ĉasado. La tendoj estis metataj ekster la urbon kaj la reĝo mem foriris kaj ekprenis sian sidejon en unu el ili. Li diris al siaj servistoj, ke neniu devas esti enlasita por viziti lin. Poste sekrete li reireis malantaŭen al la palaco, kie lia frato estis kaj li sidiĝis ĉe la fenestro, kiu permesis rigardi la ĝardenon. Post iom da tempo la sklavinoj kaj ilia mastrino alvenis tien kun la sklavoj kaj ili ade faris tion, kion Ŝah Zaman estis priskribinta ĝis la voko por la posttagmeza preĝo.

Ŝahrijar estis ekster si mem pro kolero kaj diris al sia frato: "Venu, ni foriru tuj. Ĝis ni trovos iun alian, al kiu la same tiaj aferoj okazas, ni ne bezonas regnon, kaj aliflanke ni prefere estus mortaj." Ili foriris tra la malantaŭa pordego kaj iradis dum kelkaj tagoj kaj noktoj ĝis ili alvenis al alta arbo en la mezo de herbejo, kie estis akvo-fonto ĉe la marbordo. Ili trinkis ĉe la fonto kaj eksidis por ripoziĝi, sed post iom da tempo la maro iĝis maltrankvila kaj el ĝi elkreskis nigra kolono, alta ĝis la ĉielo kaj moviĝanta al la herbejo. Ĉi tiu vido alarmis la fratojn, kaj ili grimpis al la pinto de la arbo por vidi tion, kio okazos. Tio, kio poste aperis estis alta feo (5) kun ronda kapo kaj larga brusto. Li portis keston sur sia kapo. Li venis al la marbordo kaj pluiris por eksidi sub la arbo, sur kies pinto la du fratoj estis kaŝitaj. La feo poste malfermis la keston kaj elprenis skatolon. Kiam li estis malferminta ankaŭ la skatolon, el ĝi elvenis maldika knabino, disradiana kiel la suno, kiu precize kongruis kun la tre bona priskribo, donita

(1) *Sasana, aŭ sasanida aŭ sasanana – laŭ eŭropaj lingvoj – estas vasta imperio persa ekzistinta de la jaro 224-a al la jaro 651-a de la komuna erao. Ĝi estis konata al la tiamaj homoj kiel Ērānshahr kaj Ērān en la meza persa kaj kiel Iranshahr kaj Iran en la nova persa.*

(2) *La titolo uzata tra la tuta persa regiono estas Ŝah, kiu estas tradukebla per 'reĝo' aŭ per 'imperiestro' (reĝo de reĝoj).*

(3) *Temas fakte pri "veziro", kiu en pluraj lokoj de la islama mondo en pluraj epokoj estis helpanto de la reĝo kiel ministro aŭ ĉefministro.*

(4) *Ĉi tie oni uzas la ĝeneralan vorton "feo" por eviti la uzon de la arabdevena 'ĝino'. Fakte en ĉiuj kulturoj ekzistis pli malpli samaj 'koboldoj' kaj ne valoras havi senfinan liston de nomoj por ĉiu speco de ili.*

(5) *Ĝarir Ibn Atija (Jarir ibn-Atiya): ĉefa poemisto de la umaja (Umayyad Caliphate en la angla) periodo, fama pro siaj laŭdaj kaj insultaj versoj, mortinta en 729.*

de la poemisto Atija (5)

*Ŝi briladis en la nokto, kaj aperis dume tago  
kaj la arboj ŝutis brilon al ŝi per lumiga ago.  
Ŝia radiado igas sunon leviĝi kaj brili,  
dum la luno pro la honto, povas simple nur humili.  
Kiam veloj estas forigitaj, aperas la vizaĝo.*



*Tiam ĉiuj aĵoj kliniĝas al ŝi nur pro omaĝo.  
kiel malaperas ĝojo, same zorgo ne plu daŭros.*

**Tiu ĉi teksto estas parto de la enkonduko de la originala libro de "Mil kaj Unu Noktoj", aŭ "Arabaj Noktoj". Tradukis Renarto Corsetti el la angla libro:**

## **The Arabian Nights Tales of 1,001 Nights**

*Translated by  
MALCOLM C. LYONS, with URSULA LYONS  
Introduced and Annotated by  
ROBERT IRWIN  
(Penguin Books)*



En la aŭgusta-septembra numero de Monato, Paul Gubbins en sia lasta redaktora artikolo, preskaŭ

testamento, klarigas al "Kara Eŭropo" per tre kompreneblaj vortoj, ke la britoj ne voĉdonis kontraŭ Eŭropo, sed kontraŭ si mem. Stefan Maul amike adiaŭas la meritplenan ĉefredaktoron de nia partnera gazeto. Artikoloj pritraktas politikon kaj piedpilkon en Kroatio, problemojn en la limregiono de Albanio kaj Grekio, aborto-malpermeson en Irlando, slovakon poeton, litovan arbobopintan vojon kaj la ekonomian teorion pri senkondiĉa baza enspezo. (Fonto: La septembra revuo de Esperanto)

Abonu al Monato revu ĉe: <http://www.esperanto.be/fel/mon/index.php>





En la novembra numero de nia revueto ni prezentis al vi nian novan legantinon **Elena Popova** kiu estas verkistino kaj loĝas en Bulgarujo. Ni dankas ŝin por la permeso prezenti al vi kelkaj el ŝiaj hajkoj. Ĉi foje ni prezentas al vi ŝiaj hajkoj pri sezono "**Printempo**" el ŝia libro "**La sezonoj de la animo**".

**Hajko** estas tradicia japana lirika poezio, ekzota floro en la kampo de la arta kulturo, kiu malfacile kreskas en aliaj landoj. Ĝi estas produkto de alia mondrigardo kaj defio por la artisto. Kontraste la malavara poezia esprimo en la okcidento, la japanaj poetoj kapablas nur en tri mallongaj linioj de 5-7-5 silaboj kapti la momenton kaj transdoni sentojn.

*Kun roz' en la man'  
la Printemp' ploras triste.  
La sun' sin kaŝis.*

\*\*\*

*Formika forkur' –  
averto pri ombrelo  
en la mansako.*

\*\*\*

*Narciso – floro  
de la Akva spirito.  
Trofierulo.*

*Florantaj branĉoj.  
Neĝa nokta brakumo.  
Aprila ŝerco.*

\*\*\*

*Sveltaj tulipoj –  
glasetoj da roso por  
la sun' soifa.*

\*\*\*

*Timaj okuloj.  
Singena violeto.  
Aroma invit'.*

*Mart'. Renaskiĝo  
de la naturo. Pempa  
ceremonio.*

\*\*\*

*La patrino-ter'  
naskas vivon de semo.  
La suno baptas.*

\*\*\*

*Printempo. Danco  
de knabin' kun la floroj.  
Fein' – espero.*

**Tuŝo de Animo**

**Poemo**

Mi tradukis grekan popularan kanton verkita de **Mihalis Miurbulis** kaj komponita de **Giorgos Haĝinasios**, tre fama komponisto el Tesaloniko. Jen ligilo por aŭskulti la kanton:  
<https://www.youtube.com/watch?v=NoojcR3oWIk>  
La kanto estis uzata en la samnoma TV serio "Tuŝo de Animo" kiu rakontas la amon inter ikon-pentristino kaj pastro.

**Vasil Kadifeli**

**TUŜO DE ANIMO**

*Per tuŝo de animo  
Aŭskultu, aŭskultu min.*

*Per preĝoj mi parolas  
Por vi sorĉistin' mia.  
Sed vi la kulpojn brodas,  
Brodaĵon en kor' mia.*

*Se vi amon trovos enamiĝi  
Kiel via sango vin dolori  
Ne perfidu ĝin.  
Ĉar en la lumo de la fulmo*

*Se vi amon trovos enamiĝi  
Kiel via sango vin dolori  
Ne perfidu ĝin.*

*Tempo fariĝos la juĝisto  
Kaj vi pagos ĝin.*

*Ĉar en la lumo de fulmo  
Tempo fariĝos la juĝisto  
Kaj vi pagos ĝin.*

*Per preĝoj mi parolas  
Por vi sorĉistin' mia.  
Sed vi la kulpojn brodas,  
Brodaĵon en kor' mia.*

*Per miaj krioj mi silentas  
Kaj ligas la koron mian  
Sed la rezistojn vi kalkulas  
Sorĉistin', sorĉistin' mia.*



**EPOPEO DE VORDONISI**

**Poemo**

**VORDONISI<sup>1</sup> KAŜITA  
SUB AKVO**

*Unu spiro, iu spiro  
El la profundo  
Flustras al la barkoj  
La miton de homo  
Vordonisi, Vordonisi*

*Unu spiro, iu spiro  
El la ĉielo de pasinteco  
Fariĝas pluvo  
Malsuprenigas siajn  
ŝnurojn  
Vordonisi, Vordonisi*

*Ĉeesto kaj foresto  
El la universo de fabeloj  
Envolviĝante en koloro  
Montrante sian vizaĝon  
Vordonisi, Vordonisi*

*Malpleniĝo en historio  
Plenigante ĝin entute  
Verkas sian epopeon  
Eĉ pli maljuna ol Atlantido  
Vordonisi, Vordonisi*

**Konuralp Sunal  
VORDONISIOLOGO**



<sup>1</sup>Vordonisi iam estis la deka insulo de Istanbul, kiu pereis en tertremo de la 13-a jarcento. Sur la insulo estis monaĥejo, kies fundamento nun troviĝas sub la akvo sed ne tiel profunde, do estas malgranda lumturo por averti la boatojn. Konuralp nuntempe verkas fantazian fabelan epopeon pri tiu insulo kiun li baldaŭ prezentos kiel spektaklo antaŭ la publiko.

## Ŝercoj



La instruisto al la knaboj:  
 – Kiu el vi sentas sin stulta, ekstaru!  
 Neniu leviĝas. La instruisto insistas:  
 – Mi scias, ke inter vi estas stultuloj. Ili ekstaru!

Leviĝas nur Peĉjo

– Ho Peĉjo, ĉu vi konsideras vin stulta?  
 – Tute ne, mi nur kompatis vin, kiu estis la sola staranta.

\*\*\*

- Jozefo, kion vi prenis hodiaŭ en la lernejo?  
 - Mi prenis tre bonan gradon: dek kun laŭdo.  
 - Kaj vi Peĉjo?  
 - Mi prenis la gripon!

\*\*\*

Edzo revenas hejmen kaj diras al sian edzinon.

- "Virino, la registaro decidis doni liberan domon de 150 m<sup>2</sup> al tiuj, kiuj havas kvar gefilojn. Ni havas tri gefilojn sed... nu, kiel mi povas diri tion al vi... mi havas ankaŭ unu alian filon, neleĝan!"

La virino malĝoje respondas:

- "Nu, rekonu kaj alportu lin hejmen, ni devas preni tiun domon..."

Malfrue vespere, la edzo revenas hejmen tenante sian neleĝan filon permane, sed li trovas ke hejme estas

nur unu el la tri infanoj.

- "Virino!" li krias "kie estas la aliaj du?"  
 - "Ĉu vi scias?", ŝi diras, "iliaj patroj venis kaj forprenis ilin!"




## Kruĉvort-enigmo

### HORIZONTALA

(1) Unu- aŭ plur-jara herbo kun grandaj fruktoj long-formaj kaj ĉefe violaj aŭ preskaŭ nigraj en koloro. Subjunkcio, signifanta «en la okazo, kiam», «kun la supozo, ke», «sub la kondiĉo, ke». (2) Arbo mediteranea, kultivata de ĉ. 6000 jaroj, kun daŭraj folioj ovalaj aŭ ovale lancetformaj kaj kies fruktoj estas olivoj. Konjunkcio montranta kontraŭecon, malsamecon aŭ diferencon inter tio, kio antaŭas, kaj tio, kio sekvas, kaj sekve servanta por esprimi limigan kondiĉon, eĉ ankaŭ surprizon aŭ nur simplan transiron al alia ideo. (3) Homo kaj pli ĝenerale vivulo, kies staturado estas nenormale malgranda. Kronologia sistemo, laŭ kiu oni kalkulas la tempon ekde aparta difinita tempopunkto. Nomo de la cifero "2". (4) Unuo de elektra rezistanco en la internacia sistemo de mezurunuoj. Monosakarido; malofte uzata memstare, ĝenerale en kunmetaĵoj por nomi monosakaridojn kaj ties derivaĵojn. Komenc' de batalo kontraŭ iu aŭ io. (5) Speco de lolio (narkota lolio), malagrabra grenkampa trudherbo, kies semoj estas venenaj pro enhavo de alkaloidoj produktataj de mikroskopa fungo. Alia, pli malnova nomo de nitrogeno, uzata en kemio nur en

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12



kelkaj derivaĵoj, sed konservata en agrikulturo kaj medicino. (6) Vitrosimila diverskolora substanco, per kiu oni kovras potojn, fajencon, metalon per bakado je alta temperaturo. Pronomo signifanta mi kaj ci aŭ vi. (7) Surfaco difinita per la samgravitaj punktoj de Tero respondaj al la meza marnivelo. Ĉelo, produktata kaj ellasata de la inoj de animaloj, enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo. (8) Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu



el la egalaj partoj de tuto. Rezinoriĉa lign'. La 24-a grafemo de la Esperanta alfabeto. Elemento, Au, atomnumero 79, atommaso 196,97. (9) Ostaro de la manradiko (pojno) de homo kaj de la sama parto de la antaŭaj membroj ĉe la vertebruloj. Prefikso montranta okkarbonan ĉenon en la nomoj de hidrokarbonoj, de monosakaridoj kaj de ties derivaĵoj. (10) Germana arĝenta moner' (inverse). Konstruaĵo, kies alteco estas granda rilate al la du aliaj dimensioj. (11) Malgranda, malintensa (inverse). Sufikso montranta kolektivecon kaj uzata por derivi el numeraloj aŭ kvantaj vortoj adverbojn aŭ adjektivojn signifantajn «ĉiuj kune», «en grupoj de». En Okcident-Eŭropo, ĉambr' de domo, kie oni akceptas gastojn, vizitantojn. (12) Superhoma estaĵo, kultata de homoj pro siaj supernaturaj povoj super homaro kaj mondo. Hidroksi-benzeno, C<sub>6</sub>H<sub>5</sub>OH, solida korpo, senkolora, kun akra, malagrabra odoro, kristaliĝanta en belajn pintojn kaj ekstraktata el karba gudro.

## VERTIKALE

(1) Sceno, en kiu unu sola persono, estante aŭ kredante sin sola, parolas al si mem. Disk', turniĝanta ĉirkaŭ akso kaj uzata por ebligi aŭ faciligi movadon. (2) Antikva regno, situanta oriente de malsupra Tigriso. Fari juĝan aŭ oficialan esploron aŭ metode esplori ian okazaĵon aŭ opinion. (3) Oleo, ekstraktata el linsemoj, sekigebla, t.e. oksidebla al malmola, seka

maso, kaj tial uzata en oleaj farboj por pentristoj kaj por akvimunigi teksaĵojn. Irvojo en ĝardeno aŭ parko, inter du vicoj de arboj. (4) Ĉelo, produktata kaj ellasata de la inoj de animaloj, enhavanta ĝermon de estonta samspeca animalo. La 15a grafemo de la greka alfabeto (O, o), responda al mallonga o. (5) Sufikso signifanta membron de grupo (inverse). Persono sin okupanta pri malfacila aŭ nekutima arto aŭ scienco aŭ persono aliĝinta al iu idealo, vivmaniero ks, kaj aktivanta por ĝi. (6) Loko en Anĵuo, kie troviĝas ekde la jaroj 50 de la 20a jc grava E-ista kulturdomo, instalita en kastelo. (7) Hispania rivero. (8) Patriarko, konstruinto de la arkeo kaj prapatro de la tri tiam supozataj homaj rasoj per siaj filoj Ŝemo, Ĥamo kaj Jafeto. Ĉefurbo de Aosta Valo (Italia aŭtonoma regiono ĉe Alpoj, kun loĝantaro parte franclingva). Subjunkcio, signifanta «en la okazo, kiam», «kun la supozo, ke», «sub la kondiĉo, ke». (9) Izola lok', verda kaj kvazaŭinsula meze en la dezerto, kaj kovrita de vegetaĵoj pro ekzisto de fontoj. Saturita hidrokarbono, C<sub>8</sub>H<sub>18</sub>, brulema likvo, ingredienco de benzino. (10) Muzika sono kun difinita alto. Maldika k malpeza, retosimila, travidebla teksaĵo. (11) Medikamento, kiu kvietigas doloron aŭ moderigas tro aktivan organon. Karakter', atribuita al aktoro en teatraĵo aŭ filmo. (12) Ago direkti la elvolviĝon de fizikaj, moralaj kaj intelektaj kapabloj de infano aŭ junulo kaj ties rezulto. Esprimo de ies estra volo.

## Ĉu vi legas la revuon "Esperanto"?



Se vi estas membro de UEA vi ricevas la revuon "Esperanto" aŭ papere aŭ rete kiel pdf dosiero. Membriĝo al UEA kosta nur 5 € po jaro por turkoj kaj vi ricevas 11 numerojn de revuo "Esperanto" rete. Ĝi estas tiom malmultekosta! Membriĝu al UEA kaj abonu al la revuo esperanto ĉe: <http://uea.org/alighoj>

Jen intervjuo el la septembra revuo pri la revuo:

### Leganto de la monato – Przemyslaw Wierzbowski

*Kiam kaj kial vi komencis legi la revuon Esperanto?*

Antaŭ dek unu jaroj por la unua fojo mi vizitis la Esperanto-klubejon en Bjalistoko. Deĵorantaj tie samideaninoj donis al mi kelkajn gazetojn, inter ili estis la revuo de UEA.

*Kiuj estas viaj plej ŝatataj partoj de la revuo?*

Mi ŝatas recenzojn kaj primovadajn novaĵojn. Valoraj estas intervjuoj. La ideo prezenti kuir-receptojn el diversaj mondopartoj estas tre plaĉa.

*Ĉu vi uzas la revuon por instruado aŭ informado? Se*

*jes, kiel?*

Al homoj, kiuj scivolos pri la lingvo, mi ofte prezentas la revuon kiel diversenhavan informilon de la plej granda Esperanto-organizo. Foje mi uzas ĝiajn tekstojn en kursoj mez- kaj altnivelaj, en kiuj estas pritraktataj movadaj aferoj.

*Ĉu vi kontribuas al la revuo? Per kio?*

De tempo al tempo mi informas pri okazaĵoj en la naskiĝurbo de LLZ: decembra Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj kaj eldonaĵoj de nia Esperanto Societo. Mi ŝatus kontribui iom pli, volonte mi sendus receptojn.

*Kio mankas al vi en la revuo, kion vi aldonus?*

Prilingvaj artikoloj, klarigoj de tiklaj gramatikaĵoj far spertaj esperantistoj. Mankas spritaj ŝercoj ekz. en la formo de bildstrio.





## Hundoj komprenas ĉiun vorton



La malnovaj akompanantoj de la homo prilaboras aŭdatajn vortojn de la homo en cerbaj centroj kiuj estas specialiĝintaj por enhavo kaj sono. Tiel ankaŭ ni homoj faras tion.

Se gvidanto aŭ gvidantino de hundo parolas kun sia plej bona amiko, ili faras tion ofte tiel kvazaŭ ilia vidalvidulo estus homo kaj komprenus ĉiun vorton. Kiel eksterulo oni facile kapskuas pri tio, ankaŭ se oni scias kiel unika estas la rilato de aldomigita besto al sia tenanto: Hundoj komprenas multe, ili ekzemple povas sekvi al gestoj, oni nur devas per la mano montri ien. Aŭ per la okuloj, ankaŭ al tiuj ili sekvas, ekzistas eĉ la konjekto ke tio ankaŭ markis nin: Nur ni homoj havas blankon en la okuloj, ĉe simioj la okuloj estas malhelaj. Eble ni akiris tion dum la kuro de nia komuna historio kun la hundo: Per la malhela makulo meze de blanko ni povas pli facile direkti ilin.

Sed ili legas ne nur en niaj okuloj, ili legas en la tuta vizaĝo kaj ekkonas jam je unua vido ĉu iu estas gaja aŭ kolera, kaj tiu "iu" povas esti tute fremda persono. Nu bone, ili konas nin homojn jam de almenaŭ 16.000 jaroj, de kiam oni aldomigis lupojn, eble tio okazis ankaŭ multe pli frue, estas altgrade disputate kie kaj kiam tio okazis.

Kompreneble ili jam delonge al kutimiĝis sekvi al nia voĉo, en la senco de obeado al komandoj. Sed ĉu ili ankaŭ komprenas en la senco ke oni povas paroli al ili kaj ili komprenas tion? Kiel kaj de kie oni povus scii tion? Oni devus rigardi en ilian cerbon! Ĝuste tion faris etologo ĉe universitato en Budapeŝto: Li trejnigis 18 hundojn kiuj estis akompanataj de siaj tenantoj al la laboratorio, rampi en la tubon de komputila tomografo kaj kuŝiĝi tute trankvile. Ili ne estis devigataj fari tion, ili povis forlasi la tubon aŭ la eksperimenton dum ĉiu momento.

Sed se ili restis en la tubo, tiam io aŭdiĝis al ili, virina

voĉo de sonbendo diris aŭ ion laŭdan ("bone farita") aŭ ion sensignifan ("kvazaŭ"), kaj la voĉo diris tion aŭ neŭtrale aŭ laŭde. Se alvenis laŭdo, tiam aktiviĝis regiono en la dekstra cerboduono, tiel okazas ankaŭ ĉe ni homoj, tie prilaboriĝas emociaj signaloj. Por la objektiva enhavo de la parolo aliflanke ĉe ni homoj kompetentas la maldekstra cerboduono. Ĉe la hundoj tio same estas tiel. Se ili aŭdas la frazon "bone farita" - sendepende ĉu parolate laŭde aŭ neŭtrale - tiam sekvas aktivecoj en la maldekstra cerboduono. Al la sensignifa "kvazaŭ" sekvas nenio, evidente ĝi estas perceptata kiel sensignifa.

Kaj se la "bone farita" estas elparolata ankoraŭ eĉ kun laŭdo? Tiam sekvas ne nur maldekstre kaj dekstre en la cerbo ekscitiĝo, sed ankaŭ en tute alia loko, en la rekompensa centro. "Hundoj ne nur povas distingi kion ni diras kaj kiel ni diras tion, ili povas ankaŭ kombini ambaŭ por interpreti ĝuste la signifon de vortoj, tio estas tute simila kiel ĉe ni homoj", klarigas la sciencisto.

Sed vortojn havas ja nur ni homoj, en la besta regno ekzistas nur ĝermaj strukturoj por vortoj, ekzemple malsamaj alarmkrioj ĉe malsamaj danĝeroj. Hundoj ne havas vortojn, kiel ili povas kompreni vortojn? Evidente cerboj jam longe antaŭ ni homoj lernis prilabori sonsinsekvojn en specialiĝintaj centroj laŭ du kriterioj, nome laŭ objektiva kaj emocia enhavo. Hundoj ja devas kapabli interpreti ĝuste bojadon: "La unika trajto de ni homoj ne estas la prilaborado de vortoj, sed la kapablo inventi vortojn", konkludas la sciencisto.

**Fonto:**

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2016/09/hundoj-komprenas-ciun-vorton.html?view=flipcard>

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

**MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA**

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12, sous la Ville, 55210 Creuë (Francio)

lagazeto@osiek.org <http://www.lagazeto.com>




**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun Thomas Hobbes.

**Vasil Kadifeli**

### Thomas Hobbes – La eta, la kruela kaj la malalta



Hobbes (1588-1679) estis unu el la plej gravaj pensuloj en la politika kampo. Li ankaŭ estis unu el la pioniroj de fizika kaj korpa taŭgeco. Li tre frue matene surgrimpis montojn por teni la taŭgecon de sia korpo.

Li travivis malsanon en siaj junaj aĝoj sed poste kaj eĉ en sia malfrua maljunuleco li estis tre sana kaj forta homo. En tempo, ke la averaĝa vivlongeco estis 35 jaroj li vivis ĝis la aĝo de 91.

Li ĉiam ridetis kaj havis gajan mienon, tamen li, kiel Makjavelo pensis ke homo havis malfortan econ. Por li homo estis estaĵo, kiu provis superi la alian, kiu agis nur por mono kaj per timo de morto. Li kredis ke ĉiuj homoj estis egoismaj, do leĝo kaj puno estis la nura mekanismo por kontroli ilin. Se ne estus la leĝoj kaj punoj tiam homo povus ŝteli kaj mortigi unu la alian, almenaŭ por daŭrigi sian vivitenadon. Do, por li, vivo ekster la komunumo estus “mallonga, sola, malbona, kruela, kaj kompatinda”. Li pensis, ke la povo de ŝtato estis grava. Eble homoj ekster la komunumo povus krei malgrandajn grupojn formitaj de geamikoj por sekuri siajn vivojn, sed al kiu oni havus konfidon ekster komunumo? Devas esti meĥanismo por ke oni estu certa, ke oni ne trompos sin.

Do, li apogis la penson havi fortan homon aŭ fortan parlamenton, kiu regos kaj reguligos ĉion. Laŭ li, la socia kontrakto estis tre grava afero. Tiu reganto havus la forton por puni tiujn, kiuj ne kondukas bone en la komunumo. Se ne estas tia reganto, tiam vivo estos ĥaosa, infera kaj mallonga. Kaj leĝoj sen tiu reganto, estos tute ne sufiĉaj.

En sia libro **Leviathan** (1651) li priskribis la detalojn kaj paŝojn bezonatajn pri transiro de natura kaj koŝmara situacio al sekura komunumo. **Leviathan** en la Biblio estis grandega mara monstro, sed por li, tiu estis la priskribo de ĉiopova ŝtato. La libro priskribas giganton kun glavo en unu mano kaj scepro en la alia,



kiu aperigas sin malantaŭ de monteto. Tiu giganton fakte formis multaj malgrandaj homoj. La giganto simbolizas la fortan ŝtaton kun reganton en la supro. Li kredis, ke sen reganto neniu solvo povus esti, ĉar tiam estis nur multaj homoj, kiuj danĝerigus unu la alian. Do, la transiro al forta komunumo, kiun li priskribis, estis tre grava afero. Por li, sekureco estis pli grava ol esti libera. Kaj timo de morto instigus homojn formi tian komunumon. Ili farus kontrakton por ke iu reganto apliki la leĝojn kaj puni tiujn, kiuj agas kontraŭ tiuj leĝoj de la komunumo.

Hobbes vivis en danĝera epoko. La hispana armea floto preskaŭ okupiĝis Britujon jam en la jaroj li estis naskita. Poste dum la brita civila milito li savis sin per translokiĝo al Parizo. Do, li timis ke la vera danĝero por Birtujo estis anarkio. Fakte li verkis sian libron dum li estis en Parizo.

Li ne nur estis filozofo, sed li estis unu el la homoj de Renesanco. Li havis intereson pri geometrio, scienco, antikva historio, li amis literaturon, kaj li verkis multe kaj tradukis. Poste li interesiĝis pri filozofio kaj li fariĝis materialisto, kiu kredis, ke homoj estis nur fizikaj estaĵoj. En la 17-a jarcento horloĝoj estis la plej progresinta teĥnologio. Laŭ li, simile al la partoj de la horloĝa meĥanismo, la partoj de la homa korpo kaj eĉ la cerbo kaj pensado estis la meĥanismo de homo. En lia filozofia vidpunkto ne estis spirito, sed nur la fizikaj aspektoj de la korpo. Eble tio nun estas moderna pensado, sed en lia tempo ĝi estis tre radikala penso. Li eĉ pensis, ke Dio devus esti giganta fizika objekto, kaj pro tio multaj pensis, ke tamen ne rekte, li volis deklari, ke li estis ateisto.

La ĉefa kritiko pri Hobbes estas, ke tia absoluta povo de la reganto, kiu kaj kio ajn ĝi estas, estas troa pensado. Tia reganto estus simila al nia nuntempa aŭtoritata ŝtato. Ŝtato kun senlima povo super ĝiaj civitanoj. Vivi en paco kaj liveri la rajton regi tiel al iu reganton povas esti dezirata, tamen tia troa liverado de rajtoj povas esti danĝera. Hobbes kredis nek al demokratio, nek al la kapablo de la popolo memdecidi. Se li sciis pri la krueleco de la tiranoj en la 20-a jarcento tiam eble li ŝanĝus siajn pensojn.

**(daŭrigota)**



Andreo rigardis tra la fenestro ĝis liaj kruroj estis lacaj, kaj tiam reiris al la lito kaj kuŝigis sin. Estis nenia espero en lia koro. Li devis atendi tion, kio okazos. Pri unu afero li ĝojis; Helmo jam diris, ke li ne estas murdanto, do oni ne mortigos lin dum li restas en ĉi tiu domo. Sed samtempe li ne

estas bonkora, kaj li promesis vipbati Andreon preskaŭ ĝis la morto, se li faros ian bruon. Kio okazos al li?

De tempo al tempo li aŭdis ion en la strato, kaj rigardis tra la fenestro, sed ne multaj personoj kaj neniam veturiloj pasis laŭ la strato. Sed li daŭre rigardis, ĉar eble venus okazo por eskapi.

Post eble du horoj li aŭdis, ke iu supreniras la ŝtuparon. Rapide li kuris al la seĝo kaj remetis ĝin en la angulon, kie li unue trovis ĝin. La pordo malfermiĝis, kaj envenis Helmo kun plua seka pano.

"Ĉu mi ne estas bonkora?" li ridetis. "Mi alportis vian tagmanĝon."

Andreo ne respondis, kaj la viro metis la panon sur la tablon kaj eliris. Andreo, kiu komencis esti malsata, manĝis ĝin, kaj tiam rekuŝiĝis sur la lito. Estis nenio alia fari.

Sed post iom da tempo li denove aŭdis paŝojn sur la strato. Li kuris al la seĝo, metis ĝin sub la fenestron, kaj elrigardis. Malsupre sur la strato marŝis du policianoj. Ili frapis ĉe la pordo de alia domo, kaj parolis dum kelkaj momentoj al la virino, kiu malfermis ĝin. Poste ŝi fermis la pordon kaj ili revenis sur la straton. Tiam ili iris al la pordo de la proksima domo kaj simile faris. Kiam ili iris al tria kaj kvara domoj, Andreo eksciis, ke ili faras enketojn pri io. Eble ili serĉas lin! Je tiu penso li tre ekscitiĝis.

Kiam ili preter pasis lian fenestron, li ŝvingis la manon por altiri ilian atenton, sed ili ne suprenrigardis, kaj daŭrigis la marŝadon. Andreo ne kuraĝis frapi la fenestron pro timo de la vipo.

Post momento li aŭdis frapon ĉe la dompordo, kaj povis aŭdi mallaŭtan murmuradon de voĉoj. Sed la pordo denove fermiĝis, kaj tra la fenestro li vidis, ke la du policianoj foriris, kaj daŭrigis la marŝadon laŭ la vojo.

Do, eĉ tiu espero malaperis. Li rigardis la dorsojn de la du viroj, dum ili iris al la domoj ĉe la fino de la strato, kaj sekve li restis sen espero.

La policianoj frapis ĉe la pordo de la lasta domo, faris la kutiman interparolon, kaj foriris. Subite Andreo rimarkis, ke ili revenas laŭ la strato. Post du-tri minutoj ili denove preterpasos la domon en kiu li estas. Ideo venis en lian kapon. Rapide li metis la manon en la poŝon kaj elprenis leteron, kiun li ricevis antaŭ kelkaj tagoj. Per krajono li skribis sur la koverto, grandlitere, la vortojn:

"HELPU! MALLIBERULO!"

Tiam li provis ĵeti ĝin tra la malfermita parto de la fenestro. La unuan fojon li ne sukcesis elfeti ĝin, kaj ĝi falis en la ĉambron; sed je la dua provo ĝi elflugis, kaj li rigardis ĝin dum ĝi flirtis tra la aero. Ĉu la policianoj vidos ĝin?

Ĝi falis teren, kaj kuŝis antaŭ ili. Je la granda ĝojo de la knabo unu el ili prenis ĝin kaj rigardis la vortojn. Tiam li suprenrigardis, kaj Andreo ŝvingis la manon. La policano parolis al sia kunulo, kiu ankaŭ suprenrigardis. Tiam ili rigardis la pordon de la domo kaj denove interparolis.

Post kelkaj momentoj tiu, kiu havis la leteron, rigardis Andreon, ŝvingis la manon, kaj...ili formarŝis laŭ la strato.

Andreo preskaŭ ploris. Ĉu, do, ili ne intencis helpi lin? Lia malespero revenis, sed poste li repensis. Ili legis la vortojn skribitajn sur la koverto, kaj ne povis nur lasi lin tie. Ankaŭ, lia nomo kaj adreso estis sur la koverto. Do, li atendis kun pli da espero.

Duonhoro pasis, kaj subite li revidis la du policianojn, kiuj revenis laŭ la strato. Kiam ili venis sub lian fenestron, unu el ili suprenrigardis kaj ridetis kuraĝige. Tiam ili venis al la pordo kaj frapis.

Ĉi tiun fojon estis iom da disputo, kiam la pordo malfermiĝis, kaj post kelkaj momentoj la policianoj kaj



Helmo komencis krei unu al la alia.

"Mi diras al vi," la knabo fine aŭdis, "ke tio estas oficiala permeso traserĉi vian domon. Nun ni envenas!" Kaj venis la sono de iliaj piedoj en la domo.

Ili venis rekte supren, kaj Andreo kriis, "Jen mi!" Li ne plu timis la vipon. Tiam li aŭdis la voĉon de Helmo.

"Bone; se vi scias, ke li estas tie, vi eniru kaj prenu lin. La pordo estas ŝlosita kaj mi perdis la ŝlosilon."

"Tio ne gravas," respondis unu el la policanoj, kaj tiam li vokis Andreon.

"Ĉu vi estas tie, knabo?"

"Jen mi," respondis Andreo.

Staru for de la pordo. Mi intencas pafi la seruron por malfermi ĝin."

Andreo iris al la fenestro.

"Preta," li kriis.

Venis krakego, kaj post momento la pordo malfermiĝis.

"Nun, junulo," diris unu el la policanoj. "Ĉu vi estas Andreo Trentano de farmbieno Parano apud Montoverda?"

"Tiu estas mi," respondis la knabo kun rideto.

"Ni serĉis vin. Venu kun ni. Kaj vi," li aldonis al Helmo, "estus bone, se ankaŭ vi venus."

"Vi ne havas oficialan permeson aresti min," respondis la granda viro. "Vi trovis la knabon; forprenu lin. Mi ne venos."

"Estos pli bone por vi, se vi venos," diris la policano, "sed vi ne venos, ne gravas. Mi tamen avertas vin; ne iru el la domo. Mia kunulo restos ekster la pordo ĝis kiam ni bezonos vin."

Tiam ili ĉiuj malsupreniris, kaj la du policanoj, kun Andreo, eliris el la domo. Unu el ili restis ekster la pordo, kaj la alia kondukis Andreon tra la stratoj ĝis kiam ili venis al policejo.

Tie oni donis al la knabo bonan manĝon, kiun li danke akceptis, ĉar li estis tre malsata. Dum li manĝis, la policano klarigis, kial oni serĉis lin.

"Oni telefonis nin de Montoverda," li diris, "kaj informis nin, ke oni kaptis vin kaj venigis vin trans la landlimon en Karenlandon. Mi devas konfesi, ke ni ne scias kiel oni povis preterpasi la gardistojn ĉe la rivero, sed ŝajne estis vere, ĉar vi estas ĉi tie. Ni scias ke oni ne irigis vin el Svenburg, do ni faris enketon ĉe ĉiu domo. Nun, ĉu vi klarigos al mi, kiel vi venis en nian landon?"

Andreo klarigis pri la detektiva laboro, kiun faris li kaj Lizbeta, kaj pri kiel ili sekvis la onklon laŭ la tunelo. Kiam li finis la rakonton, la policano stariĝis ekscitite.

"Kontrabandistoj, ĉu?" li ekkriis. "Do, nun ni povas aresti nian amikon Helmo Dalen. Kaj vi diras, ke vi venis sub la akvofalo? Ŝajnas, ke vi ja trovis la sekretan vojon, por kiu la kontrabandistoj tiom longe evitis nin! Sed atendu unu momenton!" Kaj li iris el la ĉambro.

Post kelkaj minutoj li revenis.

"Mi sendis viron por aresti vian kaptinton," li klarigis. "Kaj nun, ĉu vi povos montri al mi la tunelon al la akvofalo?"

"Mi kredas, ke jes," respondis la knabo, kaj la du stariĝis. Ili eliris, kaj marŝis kune en la direkto de la domo de Helmo, sed antaŭ ol ili atingis ĝin, ili renkontis alian policanon.

"Kion vi faras ĉi tie?" demandis la kunulo de Andreo al la alia. "Kial vi ne arestis lin?"

"Mi bedaŭras, sinjoro inspektoro," respondis la viro, kaj por la unua fojo Andreo eksciis, ke la unua policano estas inspektoro, "sed Helmo Dalen sukcesis foriĝi. Mi eniris la domon, sed li jam ne estis tie. Devas esti, ke li eliris malantaŭe dum Tomas atendis ĉe la antaŭo."

"Do," respondis la inspektoro, "vi venu kun ni, Braŭn; ni iras al la tunelo." Kaj ili ĉiuj rekomencis la marŝon.

Andreo kondukis ilin al la vojo per kiu li eniris la urbeton, kaj post iom da marŝado ili atingis la vojeton. Kiam ili trovis sin inter la rokoj kaj ŝtonegoj, la knabo ne estis certa, kie estas la enirejo de la tunelo, kaj ili devis serĉi.

Baldaŭ ekkrio de Braŭn anoncis, ke li trovis ĝin, kaj kune ili eniris. La inspektoro portis elektran lampon, kaj per ĝia lumo ili povis facile vidi en la tunelo. Ĝi ŝajne estis pli larĝa ol tiu ĉe la alia flanko de la rivero, kaj ili povis marŝi sufiĉe rapide.

Ili baldaŭ atingis la finon de la tunelo, kaj trovis sin sur la tre mallonga vojeto, kiu kondukis sub la akvofalon.

Subite la inspektoro haltis, kaj levis avertan manon. Tiam li montris per la fingro al la tero, kaj ili vidis

piedsignon en la malseketa tero.

"Tio estas freŝa," li flustris. "Iu venis antaŭ ni. Necesas, ke ni iru zorge."

Kaj ili antaŭeniris malrapide kun multaj ĉirkaŭrigardoj. Kun granda zorgo ili iris sub la akvofalon, kaj alproksimiĝis al la tunelo. Andreo vidis la ŝtonegon, malantaŭ kiu li lasis Lizbetan, sed estis neniu tie.

(daŭrigota)

<b>Vortareto</b>		sekreta	gizli	disputo	tartışma
		kontrabandisto	haydut	danke	teşekkürle
klarigi	açıklamak	preskaŭ	hemen hemen	espero	umut
mallaŭta	alçak sesli	ekscitiĝi	heyecanlanmak	foriĝi	uzaklaşmak
enketo	araştırma, sorgu	enveni	içeri gelmek	landlimo	ülke sınırı
piedsigno	ayak işareti	averta	ikaz eden	proksima	yain
inspektoro	başkomiser	konfesi	itiraf etmek	kaptinto	yakalayan
traserĉi	baştan başa	permeso	izin	baldaŭ	yakında
	aramak	eviti	kaçınmak	preterpasi	yanından geçip
atendi	beklemek	murdanto	katil		gitmek
krakego	büyük çatırdama	vipbati	kırbaçlamak	kuŝigi	yatırmak
grandlitere	büyük harflerle	seruro	killit	konduki	yol göstermek
kuraĝi	cearet etmek	seka	kuru	supreniri	yukarıgitmek
farmbieno	çiftlik	murmurado	mırıldanma	suprenrigardi	yukarıya dogru
elĵeti	dışarı fırlatmak	intenci	niyetli olmak		bakmak
elflugi	dışarı uçmak	mortigi	öldürmek	koverto	zarf
ĉirkaŭrigardo	etrafa bakış	zorge	özenle		
flirti	flirt etmek	svingis	sallamak		


# libera folio

SENDEPENDA MOVADA BULTENO


La bulteno raportas pri la monokolekta kampanjo de Chuck Smith kaj Richard Delamore (kiu estas el Aŭstralio, kaj ne nomiĝas Robert) por la nova projekto Amikumu, telefona aplikaĵo por trovi esperantistojn en la proksimeco. Ili ankaŭ prezentas la reeldonitan libron de Ulrich Lins, 'La danĝera lingvo' pri la persekutado de esperantistoj en diktaturoj.

(Fonto: La septembra revuo de Esperanto)

Legu la retan bultenon "Libera Folio" ĉe:  
<http://www.liberafolio.org/>



## EDIPO KAJ ANTIGONA



### (Dua parto)

En tiuj tagoj venis al Tebo heroldo el Korinto kun la mesaĝo, ke mortis la reĝo de Korintio. Edipo anstataŭ lin sur la trono. Jokasta demandis la heroldon kiel mortis la reĝo de Korintio. Ŝi eksciis, ke li tre maljuna mortis en paco sur la lito. Aŭskultinte tion, ŝi kuris al Edipo kaj raportis al li ridete, kion ŝi eksciis. "Nu, pripensu", ŝi diris, „vi turmentas vin kaj intertempe via patro en Korinto mortis pace.“

Edipon maltrankviligis la mesaĝo. Li devis pensi pri la ebria babilaĉulo.

"Tamen mi ne reiros al Korintio", li anoncis al la heroldo, „tie ankoraŭ vivas mia patrino.“

"Se vi timas, sinjoro, ke via patrino vivas tie", diris la heroldo, „mi povas trankviligi vin. La reĝo kaj la reĝino de Korintio ne estis viaj gepatroj. Mi mem portis vin iam, kiam vi ankoraŭ estis infaneto, al Korinto.“

"Kaj de kie vi portis min tien?" mirigite demandis Edipo.

"Maljuna paŝtisto, kiu paŝtis la gregojn de la reĝo de Tebo, transdonis vin al mi en la montoj.“

Kun krio de frenezulo Edipo kuris haste el la palaco. Neniu dubo eblis, la orakolo terure plenumiĝis. Li kuris tra la urbo kaj petis la civitanojn, ke ili mortigu lin por liberigi la urbon de la plago. Sed la tebanoj bedaŭris sian reĝon, ili ne malamamis lin. Edipo retrokuris en la palacon; li decidis puni sin per propra mano. En la kastelo li trovis larmantajn servistinojn. Plena de terurigo kondukis la junulinojn Edipon en la ĉambron de la reĝino. Jokasta pendumis sin. Edipo

ĵetis sin sur la mortulinon, tiris el ŝia vesto oran pinglon kaj per pikado blindigis siajn okulojn.

Jam blinda li vokis Kreonon: „Prenu la tronon kaj punu min per ekziligo!“

Kreono provis reteni la malfeliĉan Edipon en Tebo. La pesto jam malfortiĝis kaj trankvilo kaj bonfarto komencis reveni en la urbon. Edipo ne lasis konvinki sin. Kun migrobastono li foriris el Tebo. Nur lia plej maljuna filino Antigona akompanis lin. Nur ŝi ne volis forlasi sian patron dum ties malfeliĉo.

Baldaŭ konis tuta Grekio la du strangajn migrantojn. La blindan maljunulon Edipo kaj la junan belulinon Antigona, kiu kondukis lin. Ŝi almozpetis pri pano por sia patro kaj zorgis pri li. Tiel ili migris kune kaj serĉis la boskon de la venĝodiinoj, de la Erinioj. En la bosko de la Erinioj Edipo laŭ la orakolo trovos pacon.

Intertempe la filoj de Edipo, Eteoklo kaj Poliniko, plenkreskiĝis kaj ambaŭ aspiris la tronon de Tebo. Ilia konkurado ne estis prosperiga por la lando. Plena de zorgo observis Kreono la kverelon en la reĝa gento kaj konsilis al la du junuloj regadi alterne. La fratoj konsentis tion. Dum unu jaro regu Poliniko kaj dum la sekva jaro Eteoklo. Sed Eteoklo sukcesis dum sia regado tiom fortigi sian potencon, ke lia frato devis fuĝi de li.

Eteoklo fariĝis reĝo en Tebo kaj Poliniko komencis eksterlande kolekti grandan armeon por konkeri la tronon per perforto.

Ambaŭ fratoj estis tiom sangvinaj kaj nealireblaj kiel ilia patro. Komencis milito inter ili. Ambaŭ volonte estus havintaj Edipon je sia flanko. Orakolo antaŭdiris, ke venkos tiu, kun kiu Edipo sin aliancos. Tial ili komencis serĉi la patron kaj je la unua fojo dum longa tempo ili interesiĝis pri tio, kie li migradas.

Edipo je tiu tempo estis proksima de Ateno. Li sentis la proksimiĝon de la momento, kiam li trovos pacon. Li sidiĝis kun Antigona je la rando de bosko kaj ripozis. En tiu momento eksonis survoje la klakado de ĉevalaj hufoj kaj aperis grupo de ĉasistoj kun Tezeo, la reĝo de Ateno, en la fronto. Ili revenis de la ĉasado en la urbon. Tezeo tuj ekkonis Edipon, saltis de la ĉevalo kaj salutis lin.

"Kompatinda Edipo, li diris, „mi konas vian sorton kaj volonte volus helpi al vi. Venu kun ni al Ateno. Tie vi povos pasigi en paco vian maljunecon. Baldaŭ komenciĝos la frida nokto kaj vi ne povos tranokti ĉi tie en la bosko de la Erinioj.“

Aŭskultinte, ke li troviĝas en la bosko de la Erinioj, ĝojis Edipo. Li estis je la celo de sia vojaĝo. Tial li respondis trankvile kaj mallaŭte: „Mi dankas al vi,



reĝo, sed mi estas je la celo. Baldaŭ mi iros en la ombran regnon. Se vi volas helpi al mi per lasta servo, tiukaze ordonu al servisto, ke li portu novan veston al mi, por ke mi ne devos saluti la solenan momenton en la polvokovrita trivita vesto.“

Tezeo sendis serviston al Ateno, por ke li alportu novajn vestojn kaj sidiĝis al Edipo. Apenaŭ la servisto estis malaperinta inter la arboj, eksonis denove la klakado de hufoj kaj antaŭ Edipo saltis lia filo Poliniko de la ĉevalo. Lastfine li trovis la patron. Li surgenuiĝis antaŭ li, akuzis sian fraton Eteoklo, kiu forpelis lin de la trono kaj petis Edipon, ke li militiru kun li kontraŭ Tebo.

"Dum jaroj vi ne pensis pri mi", respondis Edipo la plendojn de la filo, „sed pro potencavido mi helpu al vi je la frاتمurdiga batalo. Aŭskultu la patron, kiu staras antaŭ la pordego de la submondo. Se vi militmarŝos kun armeo kontraŭ Tebo, trafos vin tio, kion vi deziras al via frato. Iru for de ĉi tie, ankaŭ miaj okuloj blindaj vidas la sanĝon de via frato sur via glavo.“

Malice Poliniko saltis sur la ĉevalon kaj galopis sen saluto kun sia akompanantaro reen al la armeo.

Eteoklon Kreono estis elsendinta al lia patro por konvinki lin reveni al Tebo. Kreono alvenis Atenon en la sama momento, kiam Poliniko kolere forlasis plengaplope la patron. Poliniko preterrajdis Kreonon sen rekoni lin. La rigardo je Poliniko esperigis Kreonon, ke li gajnos Edipon por Eteoklo. Li iris al la bosko de la Erinioj kaj sciigis al Edipo la peton de Eteoklo.

Sed Edipo nur deturnis. En la lastaj momentoj de sia vivo li divenis la terurajn sekvojn de la teba milito kaj ne plu volis enmiksiĝi en mondajn aferojn.

Tial ankaŭ Kreono foriris sen atingi la celon.

Kiam la servisto revenis el Ateno, Edipo surmetis la festan veston. Li adiaŭis de ĉiu kaj petis Tezeon ebligi la hejmiron de Antigona al Tebo. Poste estis kvazaŭ liaj blindaj okuloj denove vidus, rekte kaj per firmaj paŝoj li eniris sola, sen kondukanto, la boskon de la Erinioj. Profunde en la densejo malfermiĝis antaŭ li eniro en la submondon. Edipo malaperis, kaj malantaŭ li fermiĝis mallaŭte la tero.

Lian kadavron oni trovis neniam.

Antigona revenis al Tebo. La armeo de Poliniko jam proksimiĝis al la urbo. Ses kuraĝaj armeestroj sieĝis ses pordegojn de Tebo, la sepan sieĝis Poliniko mem.

Eteoklo timis longe daŭranta sieĝon, tial li grimpis sur la remparon kaj vokis: „Por kio, Poliniko, mortu militistoj sur ambaŭ flankoj por batalo, kiun ni ambaŭ povus entrepreni mem? Mezuru viajn fortojn en batalo kontraŭ mi! Se vi falos en la batalo, foriru ankaŭ via armeo. Se falos mi, vi fariĝos sen milito reĝo de Tebo

kaj Tebo malfermos la pordegojn por vi.“

Poliniko akceptis la proponon de la frato. Ambaŭ armeoj decidis militpaŭzon kaj kolektiĝis antaŭ la remparoj. Ekscitite kverelis la militistoj, kiu venkos. La armitaj Eteoklo kaj Poliniko renkonte iris unu al la alia kaj sur la bataalkampo komenciĝis, rigardate de la armeoj, la frاتمurdiga batalo.

Fajfante flugis la lancoj kaj depuŝiĝis de la antaŭtenataj protektoŝildoj. Dentgrincige kaj instigite de siaj militistoj, la fratoj jetiĝis reciproke unu al la alia. Sed la ŝildoj kaptis ĉiujn batojn. Kiel unua Eteoklo ne sufiĉe atentis kaj lasis gambon neprotektata. Tuj Poliniko trafis lin per bone celita lanca puŝo sur la tibion. La armeo de Poliniko jubilis. La vundita Eteoklo subigis sian doloron kaj prenis la glavon. Ankaŭ Poliniko eltiris sian glavon kaj la batalo estis daŭrigata. Fine Eteoklo sukcesis malkovri nudan flankon je la frato; li puŝis kaj trafis lin mortige. Poliniko renversiĝis antaŭ la frato.

Eteoklo kliniĝis super la mortanta Polinikon. Tiu ankoraŭfoje malfermis la okulojn, kolektis siajn lastajn fortojn, levis la glavon kaj trapikis la fraton. Ambaŭ fratoj eligis kune sian animon.

Ambaŭ fratoj estis mortaj, sed inter la armeoj eksplodis kvereleco. La armeo de Tebo rigardis Eteoklon kiel senduban venkinton, sed la alia armeo estis konvinkita, ke Poliniko venkis. La tebanoj kunportis siajn armilojn. Sed la armeo de Poliniko neglekteme venis sen armiloj. Kiam la batalo komenciĝis, la tebanoj havis avantaĝon. Ili turnis siajn lancojn kaj glavojn kontraŭ la malamiko kaj al la armeo de Poliniko rertis nur senorda retiriĝo, kiu baldaŭ ŝanĝiĝis en sovaĝan fuĝon. La militistoj de Tebo revenis kiel venkintoj kaj kun granda predo en sian liberigitan urbon.

Kreono denove ekregis. Eteoklo falis por la patrio. Tial Kreono entombigis lin kun reĝaj honorigoj. Sed Poliniko, kiu militiris kun armila perforto kontraŭ Tebo laŭ la ordono de Kreono restis sen tombo, li kuŝis sur la remparoj kiel voraĵo por vulturoj kaj vagaj hundoj. Sed tiu, kiu tamen kuraĝus entombigi lin, estu punita per mortigo. Ĉe la kadavro de Poliniko Kreono postenigis gardistojn, por ke neniu povu agi kontraŭ la ordono.

Antigona ribelis kontraŭ la malhumana verdikto de Kreono. Kiel la animo de Poliniko trovi pacon, se la korpo ne estos entombigita?

"Fratino", diris Antigona al Ismena, „nia frato kuŝas morta antaŭ la urbomuroj. Venu kun mi, ni entombigu lin antaŭ ol la vulturoj voros lin.“

"Ĉu vi ne scias, ke tio rezultigos mortopunon?" Ismena demandis terurigite.

"La morto por ago, kiu plaĉas al la dioj kaj al la homoj, estas bela morto", respondis Antigona.

"Ni ne povas fari ĉiam nur tion, kion ni pensas bona", rifuzis timeme Ismena. „Kreono estas potenco, vi ne povus eskapi de li.“

"Mi de li jam eskapis", diris Antigona, „li povas mortigi min, ĉar mi obeis la humanecon kaj la amon de fratino. Sed la humanecon kaj la amon li ne povas mortigi. Se vi ne volas iri kun mi, mi iros sola.“

Antigona ne povis konvinki la fratinnon. En senstela nokto ŝi ŝteliris sola el la palaco kaj antaŭ la urbon. Malsupre ĉe la remparo kuŝis la kadavro de Poliniko kaj apud ĝi ekdormis la gardisto. Mallaŭte trenis Antigona la fratinnon al la rivero, lin lavis kaj kovris per tero. Ankoraŭ antaŭ la matena krespusko ŝi reiris al Tebo.

La frideto de la mateno vekis la gardiston el lia dormo. La loko, kie kuŝis la mortigito, estis malplena. La gardistaro sciis, ke minacos ilin la kolero de Kreono. Tial ili traserĉis fervore la ĉirkaŭon ĝis ili trovis la spuron, kie Antigona trenis la fratinnon. Ili sekvis la spuron al la rivero kaj ekvidis la novan tombon, kiu ankoraŭ ne estis preta. Rapide ili balais la teron de la kadavro kaj kaŝiĝis malantaŭ proksima monteto. Ili atendis la revenon de la deliktinto, kiu finos sian verkon.

Ili atendis dum la tuta tago, kaj kiam krepuskiĝis, ili rimarkis mornan figuron. Sentime Antigona revenis al la tombo de sia frato. Ŝi konsterniĝis, kiam ŝi vidis, ke la kadavro ree kuŝas nuda, sed ŝi ne hezitis. Per nudaj manoj ŝi kolektis teron kaj denove komencis kovri la fratinnon. Jen subite saltis la gardistoj el sia kaŝejo, kaptis Antigonan kaj kondukis ŝin al Kreono. Ŝi ne defendis sin kaj ankaŭ ne kontestis sian agon.

"Kiel vi povis havi la kuraĝon misatenti mian ordonon?" vokis ekscitite Kreono.

"La ordonon ne donis Zeŭso, sed reĝo", respondis Antigona elkore. „Ĝi tial ne validas pli ol amo kaj humaneco. Ekzistas leĝoj, kiuj ne eliras de la reĝoj, sed estas pli gravaj kaj pli daŭraj.“

"Tion pensas nur vi!" kriis Kreono.

"Ne", diris Antigona, „tion pensas ankaŭ la popolo de Tebo, sed antaŭ vi ĝi silentas.“

"Kaj ĉu vi ne hontas agi alie ol la aliaj ĉi tie?"

"Mi ne hontas, ke mi honoras la mortan fratinnon. La morto donas al venkitoj kaj venkintoj la saman rajton. Kaj pli ol la vivon vi ne povas preni de mi.“

"Vi parolas kuraĝe, via kuraĝo sur la vojo al la submondo ne forlasu vin! Gardistoj al mi!"

Armitoj alkuris, kaj Kreono ordonis al ili konduki la fratinnon en senhoman regionon kaj tie enmasoni ŝin vivanta en rokan kavernon. La sbiroj kun Antigona jam estis survoje, kiam Hajmono, la filo de Kreono, eksciis tion. Antigona estis lia fianĉino, sed pri tio la senkompata Kreono ne okupiĝis. Hajmono rapidis el la palaco por malhelpi je la punloko la verdikton de la patro.

Ankaŭ la blinda profeto Tiresio venis en la palacon kaj avertis la reĝon pro ties kruela decido. Antaŭsignoj anoncis al la maljunulo, ke la reĝan genton minacas malbona sorto. Tiresio foriris kaj Kreono pripensis la aferon. Subite li ektimis la punon de la dioj. Li ordonis rapide enjungi la ĉevalojn kaj saltis mem sur la ĉaron kaj veturigis ĝin rapide kiel la vento al la kaverno. Sed jam survoje li eksciis la teruran mesaĝon: Antigona pendumis sin en la kaverno per sia vualo, kaj lia filo antaŭ la morta fianĉino traboris sin per glavo. Kiam la edzino de Kreono eksciis tion, ŝi decidis morti suicide.

Kiom volonte Kreono ĉion rebonigus kaj revekigus la mortintojn en la vivon! Sed tia estas la sorto de tiranaj reĝoj. Per ununura decido ili povas neniigi feliĉon kaj vivon de siaj subigitoj, sed per neniua decido ili povas redoni la detruitan feliĉon kaj revivigi la mortintojn. Malgaje vivis Kreono ĝis Morto kondukis ankaŭ lin en la submondon.

Tradukis **Donjo & Cezar** laŭ la ĉeĥa originalo

"Staré řecké báje a pověsti"

de la eldonejo ALBATROS en Prago

Korektis **Vladimir Türk**

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/cezar/4621556>

## Internacia Tago de Homaj Rajtoj



TAGO DE HOMAJ RAJTOJ  
10a de decembro

El la libro "Lingvaj babilaĵoj" de Andre Cherpillod:

**Krokodili, aligatoroj, kajmani, gaviali**



Versajne ne estas en la mondo eĉ unu esperantoparolanto, kiu ne konas la verbon krokodili: "paroli nacilingve en esperantista medio". Sed ne ĉiuj konas ĝian devenon. Kelkfoje, plej neimageblaj

fantazioj estis elmetitaj pri la origino de tiu vorto. Krokodiloj estas ĉarmaj bestoj, ĉu ne? Precipe de malproksime, aŭ sur televida ekrano. Sed kiu rilato estas inter krokodiloj kaj nacilingva parolado?

En la dua distrikto de Parizo, ne tre malproksime de la Nacia Biblioteko, troviĝas la "passage Chiseul". Ĝi ne estas ordinara strato, sed tegmentita pasejo kun butikoj; ĝi iras de la "rue des Petits-Champs" ĝis la "rue Saint-augustin". Nu, en la tridekaj jaroj, unu el la kafejoj de tiu pasejo estis la kafejo Talma (el la nomo de fama franca aktoro, dum la tempo de Napoleono). Ĝi estis la ĉiumonata rendevuejo de la Pariza Esperanto-Grupo. Kial ĝuste tiu ĉi kafejo? Pro tio, ke la kelnero, iu Ferrari, estis esperantisto. Antaŭ ol esti kelnero, li praktikis aliajn metiojn: li estis sinsekve hartondisto kaj taksiaŝoforo. Lia lingva nivelo ne estis tre alta, tiel ke Raymond Schwartz diris iam pri li, kun sia kutima humuro: "Kelkfoje Ferrari... povas erari!"

Sed Ferrari estis fervora esperantisto, eĉ iom fanatika. Kiam iu el la kunvenantoj cedis al la pigreco, kaj parolis ne plu esperante, sed france, la brava kelnero grumblis: "kia sovaĝulo! Kia krokodilo!" Verŝajne li konsideris, ke paroli nacilingve en esperantista rondo estas ago de sovaĝulo. Kaj en lia buŝo, la vorto krokodilo difinis sovaĝan beston, sovaĝulon.

La uzado de tiu vorto amuzis la grupanojn, kiuj rapide ŝanĝis ĝin al verbo: "li krokodilas, ni krokodilas, ne plu krokodilu ktp". Tiel, la Esperanta leksiko pliriĉiĝis tiam je unu verbo: **krokodili** "paroli nacilingve en esperantista medio (PIV)". Iom post iom, tiu dirmaniero internaciĝis. El tiu antikva tempo, ĝis antaŭ kelkaj jaroj, restis vivanta nur Roger Bernard, kiu tre bone memoris la naskiĝon de tiu vorto kaj rakontis ĝin al mi. Sed li mortis la 10an de Augusto 1997, precize naŭdekjara.

Estas sciata, ke en la medio de TEJO, naskiĝis pli poste la verbo **aligatoroj** "paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo nur de parto de la ĉeestantaro" kaj ankaŭ la verbo **kajmani** "paroli nacilingve en lingvo, kiu estas gepatra lingvo de neniu el la ĉeestantoj" (difinoj troveblaj en la libro "Knedu min Sinjorino!", de Renato Rosetti).


Sed io mankas. Antaŭ kelkaj jaroj, en Grezjono, ĉe la matenmanĝo, mi interŝanĝis kelkajn vortojn kun iu samideano: "ĉu vi dormis bone? -si, vemo gudiko, danob oli" (traduko: ĉu vi dormis bone? -jes, bone, mi dankas vin). Ĉi-okaze, neniu taŭgas, el la tri ĉi-supre cititaj verboj, ĉar ni parolis ne nacilingve, sed internacilingve, kvankam ne esperante, en esperantista medio: tio estis Volapuka konversaciato.

Por tiu nocio, oni eble povus krei la plian neologismon **gaviali**. Ĉu? Tiel, estus reprezentitaj la kvar bestoj de tiu amema kaj aminda reptilia ordo.

Sed ĉu tio valoras la penon? La gavialado estas tiel malofta evento...

**Fonto:**  
<http://www.ipernity.com/blog/rafmagon/126857>

**Internacia Tago de Homaj Rajtoj**



**Zamenhof Tago**

**Esperanto Libro Tago**

**Decembro 15**





<b>Vortareto</b>		internaciĝi	uluslararası olmak	reptilia	sürünge cinsi
		leksiko	sözlük	sovaĝulo	vahşi kişi
cedi	vazgeçmek, bırakmak	medio	ortam	tegmentita	üstü kapalı, damlı
deveno	köken	neimagebla	tahayyül edilemez	verşajne	açıkçası
dirmaniero	deyiş şekli	neologismon	yeni deyiş		
gepatra	anadan gelen	nocio	nosyon		
grumbli	homurdanmak	pigreco	<b>tembellik</b>		
		pliriĉiĝi	zenginleşmek		

## El la libro de "Dao De Jing" verkita de cina filozofo Laocio la fondinto de (5)

### EL UNUA PARTO - TAŬO



#### 11

Tridek spokoj ĉirkaŭas nabon:  
inter ili la malpleno ekestigas la uzeblecon de l'  
ĉaro.

Oni knedas argilon kaj formas el ĝi ujojn:  
En ties malpleno ekestas la uzebleco de l' ujoj.  
Oni faras pordojn kaj fenestrojn, por ke fariĝu  
ĉambreto:

En ties malplenoj ekestas la uzebleco de la  
ĉambreto.

Tial tio, kio ekzistas, servas la posedon.  
Tio, kio ne ekzistas, servas la faradon.

#### Rimarkoj de Cezar

Tiel tradukis Wang Chongfang la du lastajn liniojn:

.Tial ni tiras avantaĝon el tio, kio ekzistas,  
Kaj uzas la avantaĝon per tio, kio ne ekzistas.

La ĉapitro entenas pure dialektikan pensadon! Rado estas  
rado ĝuste tial, ĉar ĝi uzas la malplenojn inter la spokoj por  
esti rado. Do, ne nur tio, kio ekzistas, utilas, ankaŭ tio, kio ne  
ekzistas. Ekzemple la truoj en kribrilo, kion sprite rimarkis la  
poeto Ringelnatz en sia poemo: "Mi tiom amas vin". Li volas  
esprimi, ke en amrilato plej gravas tiu, kiu malĉeestas, kiu  
postlasas en postrestinto kvazaŭ vakuan senton.

#### Mi tiom amas vin - Joachim Ringelnatz

Mi tiom amas vin!	La temp' sur voj'
Mi al vi, se vi ĝin bezonus,	ĉiun belon negas.
eĉ kahelon el mia forno	Jen eĉ boj',
donus.	la hund' ne legas,
	skribul' ne estas.

Mi ne malicis al vi, hoj!	Pro dev' ni ne restas.
Min kaptas sento de trist'.	Mi ridas.
Ĉe l' deklivoj de l' fervoj'	Plej grave estas je kribrilo
lumas abunde genist'.	truoj je l' fin'.
	Mi tiom amas vin.

Jam for - bedaŭr'.

Mi vin ne forgesas,  
vojaĝas.

ĉio kun longa daŭr'  
eksaĝas.

**tradukis Cezar**

#### 12

La kvin diversaj koloroj blindigas la homojn.  
La kvin diversaj sonoj surdigas la homojn.  
La kvin diversaj gustoj sentigas la langon de l'  
homoj.  
Hastado kaj ĉasado frenezigas la korojn de l'  
homoj.  
Raraj aĵoj konfuzas la vivon de l' homoj.

Tial la saĝulo zorgas por la stomako kaj ne por la  
okuloj.  
Li forigas tion kaj prenas ĉi tion.

#### Rimarko de Cezar

Wang Chongfang tradukas por "hastado" : "ĉevalvetkuro".  
Krome li tradukas: "La raraj valoraĵoj tentas al rabado kaj  
ŝtelado." En la ĉina originala teksto laŭ Anniespera "chi  
cheng" signifas: 1) Kuregi sur ĉevalo 2) libera vagado/irado.

(daŭrigota)



La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas faka asocio de esperantistaj instruistoj kaj instruantoj de Esperanto

fondita en 1949. Ĝi estas ne-registara organizo.

### Celoj:

- Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.
- Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.

### Taskoj:

- enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn,
- celtrafa instruado de Esperanto en ĉiuj medioj kaj ĉiuj niveloj,
- esplorado kaj solvado de pedagogiaj problemoj en la lingvo-instruado,
- eldonado de modernaj lerniloj, fakaj revuoj, libroj kaj informfolioj,
- organizado de internaciaj aranĝoj (ILEI-konferenco, seminarioj ks),
- prizorgo de internaciajn ekzamenojn pri kapablo en apliko kaj instruado de Esperanto,
- kontaktoj kun registaraj kaj edukaj instancoj kaj kun aliaj organizaĵoj kies celoj estas konformaj al tiuj de la Ligo,
- aranĝado kaj utiligado de retpaĝoj kaj diskutlistoj.

### Revuoj de ILEI

- Internacia Pedagogia Revuo
- Juna Amiko

### Projektoj

- Interkulturo (IK) - retpaĝaro kaj reto de la kunlaborantaj lernejoj kaj junularaj grupoj dise en la mondo por interkultura lernado per esperanto.
- Flugiloj de Malfacila Vento - trejnseminarioj kaj metodikaj materialoj por junaj instruistoj kaj instruemuloj de Esperanto.
- De la 13a ĝis la 16a de majo 2015 okazis en Svislando, en la Universitato de Neŭŝatelo kaj en CDELI en La Chaux-de-Fonds la tria Tutmonda Kolokvo pri instruado de Esperanto, organizita de ILEI.

### Konferencoj

ILEI konferencas ĉiujare en alia lando kun varia faka, kultura kaj turisma programo inkluzive de:

- simpozio pri la konferenca temo
- lingva festivalo.
- ILEI-konferencoj. Jen la plej freŝaj.

- Kongreso 2017: Busano, Suda Koreio. Edukado al respekto plena turismo
- Konferenco 2016: Nyiregyhaza, Hungario. Novaj vojoj de lernado
- Konferenco 2015: Oostende, Belgio. Granda paco post grandaj militoj
- Konferenco 2014: Montevideo, Urugvajo. Lingva justeco en praktiko: latinamerikaj spertoj kaj tendencoj
- Konferenco 2013: Herzberg-Sieber, Germanio. Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj

### Sekcioj:

La 10-an de januaro 2014 ILEI havas 35 sekciojn, 13 reprezentantojn kaj 12 kontaktpersonojn. Laŭ tio ILEI havas piedon en 60 landoj.

### Partneroj

- edukado.net - servo por instruistoj kaj lernantoj de Esperanto
- lernu.net - plurlingva paĝaro por lerni Esperanton
- La Lingva Prismo
- E@I
- Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)
- Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)
- Springboard to Languages / Lingvolanĉilo, Britio
- Universitato Adam Mickiewicz (UAM), Poznano, Pollando
- Interkultura Centro Herzberg (ICH), Germanio
- Kastelo Gresillon, Francio
- Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS)
- Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, Bydgoszcz, Pollando
- Fondumo Zamenhof, Bjalistoko, Pollando

### Estraro

La Estraro de ILEI gvidas la Ligon. Ĝi estas elektata de la supera instanco, la komitato. La 20-an de julio 2015 dum la ILEI-Konferenco en Ostendo elektiĝis nova estraro. Ĝi havas mandaton ĝis la jaro 2018. La Komitato decidis, ke la estraro konsistu el 7 membroj. 3 membroj plu deĵoros. Estis 6 kandidatoj por 4 postenoj. Apartenas al tiu nova skipo:

- Prezidanto: Mireille Grosjean "Mirejo,, Svisio (reelektita[3])
- Vicprezidanto: Gong Xiaofeng "Arko,, Ĉinio (reelektita)
- Sekretario: Emile Malanda Nyanga, Sud-Afriko
- Vicsekretario: Elena Nadikova, Rusio
- Estrarano pri financoj: William Harris, Usono (reelektita)
- Estrarano: Radojica Petrović, Serbio (reelektita)

- Estrarano: Ivan Colling, Brazilo

### Listo de prezidantoj ekde 1972:

- Helmut Sonnabend (1972-1985) (kontrolenda)
- István Szerdahelyi (1985-1987)
- Edward Symoens (1988-1991)
- Stefan MacGill (1991-1993)
- Duncan Charters (1993-1998)
- Mauro La Torre (1998-2003)
- Radojica Petrovic (2003-2009)
- Stefan MacGill (2009-2013)
- Mireille Grosjean (ekde 2013)

### Historio

ILEI estas fondita la 12-an de aŭgusto 1949 en

Bournemouth UK. Antaŭ la dua mondmilito ekzistis Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE), fondita en 1908. La unua estraro en 1949 konsistis el Violet C. Nixon (Britio, prezidantino), Einar Dahl (Svedio, sekretario-kasisto), Jeanne Dedieu (Francio, konsilanto) kaj P. Korte (Nederlando, konsilanto). Poste ILEI havis pliajn prezidantinojn: Jeanne Dedieu (Francio) en 1956 kaj Catina Dazzini (Italio).

Retejo de ILEI: <http://www.ilei.info/>

### Fonto:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Ligo\\_de\\_Esperantistaj\\_Instruistoj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Ligo_de_Esperantistaj_Instruistoj)

## Unu taso da teo superas armilojn

Sendis: Horio Jasuo



*En la maldekstra foto virino faras teon okaze de la novjara festo de la maljunulejo, en kiu antaŭe mia patro estis prizorgata. Tiu ĉi teceremonio tute ne estis formala, sed mi miris, ke ŝi, la posedantino de tiu*

*maljunulejo, povas fari teon laŭ la tradicia maniero de teceremonio. Malantaŭe staras du virinoj kiel helpantoj. Certe ankaŭ ili povas fari teon, apartenante al iu tesekto. Tiamaniere multaj kleraj japanaj virinoj havas konon pri farado de teo.*



*Dum tiuj ceremonioj oni uzas pulvorigitan teon nomatan maĉĉa. Ĝi aspektas kiel en la meza foto. Oni ŝaŭmigas ĝin anvarma akvo, kaj jen. La*

*kvanto de farita teo estas malmulta, kaj la gusto estas iom maldolĉa. Tamen tiu gusto kongruas al japanstila dolĉa kuko, kiun oni gustumas antaŭ ol gluti teon.*



*En Japanio troviĝas kelkaj teskoloj. La plej famaj estas Omote-Senke kaj Ura-Senke. La tradicio de teo datiĝas de la 15a aŭ 16a jarcento. Tamen hodiaŭ mi ne intencas raporti pri tiu tradicio, sed mi intencas traduki intervjuon de s-ro Sen Genŝicu, majstro de Ura-*

*Senke. Ĉi tiu intervjuo aperis en septembro en la journalo Mainiĉi.*



**Sen Genŝicu:** naskiĝis en 1923 en Kioto. En 1943 vokita al la mararmeo. En 1964 fariĝis 15a skolestro de Ura-Senke. En 2002 eksiĝis de tiu posteno. Ekde 2005 estas japana amikeca ambasadoro de Unuiĝintaj Nacioj, kaj ekde 2012 amikeca ambasadoro de UNESCO. Nun 92-jara.

### Intervjuo

Komenciĝis milita trejnado al la lernantoj en la dua lernojararo de mezlernejo. Tiun tempon, kiam ni ne agadis kuraĝe, oni kritikis nin kiel malkuraĝulojn. Kiam mi forkuros de tiu "kuraĝaj!" agadoj, oni kritikis nin kiel malpatriotojn. En tia modo milito grandiĝis. Mi estis destinita heredi la skolon Ura-Senke, sed kiam mi estis 20-jara studento en 1943, mi estis vokita al la militservo. Mia praulo Senno Rikjuu (1522 ~ 1591), fondinto de la teceremonio, estis kaj teisto kaj militisto, do kiel unu el la posteuloj de tiu familio mi honorite eniris en la armeon. Same kiel en la fluo de rivero, mi ne povis rezisti la modon.



Mi eniris en la mararmean trupon en la urbo Maizuru en la gubernio Kioto. Mi fariĝis lerta en pilotado, do poste mi estis sendita al la aerbazo de Cuĉiura en la gubernio Ibaraki. Tie mi trejnigis min kaj eltenis multajn malfacilojn por ke mi fariĝu bona oficiro.

Poste mi estis sendita al la aviadiltrupo en la gubernio Tokuŝima. En 1945 Kamikazo-trupo estis organizita. Niaj aviadiloj estis nomataj Ŝiragiku (blanka krizantemo) kun helicoj. Ili estis ŝarĝitaj per du bomboj 500 kilogramojn pezajn sub ambaŭ flugiloj, do estis malfacile ekflugigi ĝin. Mi sentis danĝeron, sed post kiam mi forlasis mian hejmon, mi estis preta morti iam ajn, ĉar mi kredis, ke tio protektos mian familion.



Unu tagon mia amiko el la universitato Kioto diris al mi: "Mi volas trinki teon en via teĉambro, se mi postvivos la militon". Tiun momenton mi vere konvinkiĝis, ke mi neniam povos reveni hejmen. Mi emociiĝis kun larmoj, kaj subite mi volis revidi mian patrinon. Mi turnis min en la direkto de Kioto kaj kriegis "Panjo!" Sekvante min, ĉiuj kriis "Panjo!" kun larmoj. Mi volis, ke panjo karesu al mi la kapon, samkiel ŝi karesis min, kiam mi estis knabo.

Ĉirkaŭ 60 junuloj el mia trupo flugis al Okinavo kiel kamikazoj kaj mortis. Antaŭ ol mi flugis, mi estis sendita al alia trupo kaj feliĉe mi estis savita. Kiam mi sciis, ke Japanio malvenkis, mi malŝveliĝis, kaj samtempe kolerego fontis en mi. Mi demandadis min, por kio miaj amikoj devis morti. Mi revenis hejmen en septembro 1945. Ĉe la pordo mi sidis sur la tero kun mia glavo antaŭ mi, kaj anoncis: "Malvenkinte, mi revenis".

Baldaŭ venis usonaj oficiroj al mia hejmo por lerni japanan kulturon. Mia patro klarigis tekulturon al ili en la angla lingvo. Ili mallerte sidis japanmaniere en la malgranda teĉambro kaj ĝuis teon, salutante unu al la alia: "Kiel estas la gusto de la teo?" "Bonvolu vi unue gustumi teon". Mi estis ŝokita. Antaŭ teo ne ekzistas diskriminacio, nek venko aŭ malvenko. Tio estas forto

de kulturo! Kulturo estas paco! Unu taso da teo estas pli forta ol armiloj.



En 1951, invitite, mi vizitis Usonon por instrui tekulturon, kaj de tiu tempo mi vizitis 70 landojn por instrui spiriton de teo.

Por paca mondo estas grave malfermi sian koron. Kun malferma koro ĉiuj homoj fariĝas amikoj. Sed en la mondo ankoraŭ troviĝas multaj suferantoj pro militoj kaj malsatego. Japanaj militmortintoj en la profundo de la maro ankoraŭ sentas malĝojon, vidante tian mondon.

Mi deziras, ke japanoj havu pli da intereso pri la mondo. Mi esperas, ke ekestu pli multaj homoj, kiuj agadas por paco. Mi havas iom da faredaĵoj en tiu ĉi mondo. Se mi povos vivi iom longe, tio estos mia feliĉo.

**(Fino de la intervjuo)**

Laŭ la ĵurnalo Mainiĉi (la 5an de februaro 2016) nun tiu japana teo estas ŝatata en la mondo. En Novjorko la kafejo "Matcha Bar (maĉĉa-trinkejo)", kiu malfermiĝis en 2014, flamigis la tefuroron tie. La japana tekompagnio Ito-en malfermis tri vendejojn en Usono. Ĝi vendas tesaketojn ne nur en Usono sed ankaŭ en Aŭstralio. Ankaŭ en Azio japana maĉĉa estas ŝatata.

Nun japanaj manĝaĵoj ĝenerale estas tre ŝatataj en la mondo. Oni diras, ke en ili troviĝas koro de harmonio. Teceremonio estas la plej bona modelo de tiu spirito. Ĝi okazas en malgranda, modesta ĉambro, kaj la gastoj respektas unu la alian. La mondo de teo plej alte taksas harmonion. Mi esperas, ke s-ro Sen, kiu speris kruelon de la milito, havos longan vivon por disvastigi harmonion kaj pacon en la mondo pere de la spirito de teo.

**La 30an de januaro 2016**



Laŭ raporto farita de boredpanda en marto, belaj pavoj kiel birdoj por elmontrado troviĝas en multaj zooj de la mondo. Per siaj buntaj

longaj plumoj ili ĉiam allogas al si multajn vizitantojn.

kvankam originis el varma kaj humida loko, tamen povas travivi vintron en la nordo; sed la verda ne



povas elteni malvarman veteron.



Tamen pro longa agado surtere, ili perdis flugkapablon, kaj tre malmultaj homoj vidis flugadon de tiuj birdoj.

Laŭ raporto, pavoj flugas en la aero nur vizaĝe al danĝero, sed surprize iliaj longaj plumoj neniam malhelpas la flugadon.

Pavoj ne povas longe flugi. Tamen la rapido de ilia flugado povas atingi 16 km/hore.

Pavoj vivas ĉefe en sekaj areoj, kiaj sur duondezerta herbejo, en arbustoj kaj falfoliaj arbaroj, speciale ĉe akvo. Ili nestas surtere, sed ripozas sur arbo. Matene kaj vespere ili grupe serĉas manĝaĵojn en kampoj, prenante semojn, insektojn, fruktojn kaj malgrandajn reptiliojn kiel ĉefajn nutraĵojn. En la meza februaro ĉiujare ili kopulas, kaj inaj demetas 4-8 ovojn.

Redaktoro: Wang Lihua

Fonto: [http://www.espero.com.cn/2016-03/17/content\\_38051543.htm](http://www.espero.com.cn/2016-03/17/content_38051543.htm)

El Popola Ĉinio

<http://www.espero.com.cn/index.htm>

Estas blua kaj verda pavoj. La verda, reĝino de birdoj, estas protektata en la unua klaso. Ili vivas ĉefe en



Sudorienta Azio, Orientaj Hindioj, Barato, Birmo, Javo kaj aliaj lokoj de Sudazio. La blua



<b>Vortareto</b>		elmontrado	gösteri	origini	ortaya çıkmak
		elteni	dayanabilmek	pavo	tavuskuşu
allogi	çekmek (ilgi)	falfolia	yaprak doken	reptilio	sürüngen
arbusto	çalı	herbejo	otlak	tamen	buna rağmen
atingi	ulaşmak	humida	nemli	travivi	yaşamak,
bunta	alacalı, renkli	kopuli	çiftleşmek		geçirmek
danĝero	tehlike	kvankam	olmasına	vizaĝe al	karşısında
demeti	bir yere koymak		rağmen	zoo	hayvanat bahçesi
duondezerta	yarı çöl	nesti	yuva yapmak		



## Kuiru kun mi

### Malgrandaj kiŝoj kun legomoj

Hodiaŭ ni preparas ĉi tiujn malgrandajn kiŝojn de legomoj, bongustajn kaj taŭgaj kiel aperitivo aŭ antaŭmanĝo kaj kiel garnaĵo.

#### INGREDIENCOJ

- 1 rulo de folipasto
- 2 kukurbetoj
- 2 karotoj
- 1 brokolo
- 1 ovo
- 200 ml da kremo
- parmeseano
- pipro
- oleo
- salo
- muskato



fari la mafinoj, kaj aranĝas la kukurbetojn kaj la karotojn en samcentraj cirkloj ekde la ekstera rando kaj ni fermas kun floro de brokolo.

Ni metis en bovlo batitan ovon, kremon, muskaton, salon, pipron, kaj parmeseanon kaj miksas. Ni verŝas la miksaĵon sur la malgrandajn kiŝojn.

Ni metis en antaŭvarmigita forno ĉe 200 gradoj por 20-25 minutoj.

**Bonan apetiton!**

Ni tranĉas la legomojn en tre maldikaj tranĉaĵoj kaj laŭ iliaj longaj flankoj. Ni duonbrogas ilin dum kelkaj minutoj en sala akvo. Ni salas, pepras, kaj ni metas malvarmigi ilin.

Ni prenas la rulon de folipasto jam preta kaj tranĉas multajn malgrandajn rondajn formojn. Ni povas helpi nin kun glaso. Ni metas la formojn en malgrandaj fajrorezistaj potoj de papero aŭ silikono, tiuj uzitaj por

#### Fonto:

<https://kuirukunmi.com/2016/04/10/malgrandaj-kisoj-kun-legomoj/>

Vortareto		rulo	rulo, sargi	poto	piŝirme kap
kiŝo	kiŝ	folipasto	milföy hamuru	mafino	muffin (küçük kek)
legomo	sebze	kukurbeto	kabak	batita	çırpılmış
bongusta	lezzetli	muskato	hint cevizi	antaŭvarmigita	önceden ısıtılmış
taŭga	uygun	duonbrogi	yarım pişirmek	grado	derece
garnaĵo	garni, süsleme	sali	tuzlamak		
ingredienço	muhteviyat	pepri	biberlemek		
		fajrorezista	ateşe dayanıklı		

## Eŭropa Bulteno

En julio-aŭgusto la Bulteno longe traktas pri la lingvopolitika konferenco de Nitro, priskribita ankaŭ sur la 180-a paĝo de nia revuo. Sur kvar paĝoj vi povas legi la esperantlingvan

malferman parolon de la eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis, kaj la tutan tekston de la Nitra Deklaro. EEU anoncas, ke ilia projekto "Rakontoj de rememoro: rememoroj pri rifuĝintoj el jugoslava milito por kreo de paca kaj tolerema EU" ricevis eŭropunian subvencion kadre le la programo 'Eŭropo por civitanoj'. Legeblas raportoj pri la UK, pri esperantista partopreno en la pollanda muzikfestivalo Woodstock, pri la 75-a Hispana Kongreso kaj pri reta kurso laŭ la zagreba metodo.

(Fonto: el la septembra revuo de Esperanto)

Elŝutu kaj legu la Eŭropan Bultenon ĉe: <http://www.europo.eu/europa-bulteno>



## Origino de esperantaj vortoj

En la historio de la homaro estis multaj geniuloj. Unu el ili estis Zamenhof. Vere la kreado de internacia lingvo - lingvo, kiu taŭgas por la komunikado inter la homoj samkiel naturaj lingvoj - estis genia faro.

La fakto, ke li parolis plurajn lingvojn, ne estas tiom genia, ĉar sufiĉe multaj homoj scipovis kaj scipovas plurajn lingvojn, eĉ pli ol Zamenhof. Sed la kono de aliaj lingvoj permesis al li ekpensi unu gravan karakterizaĵon de Esperanto: la integron de vortoj de pluraj lingvoj en la esperantan vorttrezoron. Evidente ne eblis - kaj ne eblus - uzi vortojn el ĉiuj lingvoj de la mondo. Kiel eŭropano Zamenhof elektis kelkajn eŭropajn lingvojn.

Oni diras, ke inter 65 kaj 80 procentoj de la esperanta leksiko estas latindevenaj. Tio ne signifas, ke tiom da vortoj originas rekte el la latina.

Unue multaj devenas de latinidaj lingvoj (precipe la franca); due ekzistas la tiel nomitaj internaciismoj (vidu "internacia vorto" en la esperanta Vikipedio), tio estas, vortoj ĝenerale latin- aŭ grekdevenaj, kiuj estis disvastigataj - ofte tra la angla aŭ la franca - en la plejmulton de la grandaj lingvoj de la mondo. Temas aparte pri sciencaj kaj teknikaj terminoj, sed ne nur.

La internaciismoj iomete faciligas la lernadon de fremdaj lingvoj, almenaŭ de la leksiko. En la kazo de Esperanto, kies gramatiko estas tiom simpla, facileco de la lernado de la vorttrezoro estas plia grava faktoro.

Rilate la vortojn, kiuj ne estas internaciismoj, sed klare originas el iu eŭropa lingvo, la esperantistoj scipovantaj tiun lingvon evidente havas avantaĝojn.

Kiam mi komencis memlerni Esperanton, mi ĉiam surpriziĝis - kaj ĝojis - kiam mi malkovris vortojn klare originaj el la germana, angla aŭ franca.

Ekzistas granda "Etimologia Vortaro de Esperanto" kaj "Konciza Etimologia Vortaro" (kiujn mi bedaŭrinde ne posedas), en kiuj oni povas ekscii la devenon de la esperantaj vortoj. Por tiuj aŭskultantoj, kiuj ankaŭ ne posedas ilin kaj kiuj ne scipovas la tri menciitajn lingvojn, mi prezentas kelkajn de tiuj vortoj. Evidente ekzistas multegaj aliaj, kaj ofte ekzistas similaj vortoj en aliaj latinidaj aŭ ĝermanaj lingvoj.

Cetere, kvankam la unuaj lingvoj, kiujn Zamenhof parolis, estis la pola, la rusa kaj la jida, li elektis multe

malpli da vortoj el tiuj lingvoj por la esperanta vorttrezoro ol el la latinidaj kaj ĝermanaj.

El la angla originas ekzemple:

boat → boato; chief → ĉefo; help → helpi; just → ĵus; pale → pala; she → ŝi; shell → ŝelo; ship → ŝipo; stone → ŝtono; sun → suno; train → trajno; yes → jes

El la franca ekzemple:

acheter → aĉeti; coucher → kuŝi; fromage → fromaĝo; langue → lango; larme → larmo; manger → manĝi; mâcher → maĉi; mère → mem; plage → plaĝo; presque → preskaŭ; reprocher → riproĉi; toilette → tualetto; toucher → tuŝi; voyage → vojaĝo


El la germana ekzemple:

bedauern → bedaŭri; Brett → breto; Fest - festo; Flug → flugo; früh → frue; halten → halti; Hund → hundo; Land → lando; lecken → leki; pflücken → pluki; satt → sata; scheinen → ŝajni; schrumpfen → ŝrumpi; sorgen → zorgi; sparen → ŝpari; stehen → ŝteli; Stufe → ŝtupo; Wunde → vundo; wecken → vekti

**Herbert A. Welker el Brazilo**

**Fonto (Vi ankaŭ povas aŭskulti la sonardosieron de ĉi tiu artikolo) :**

**<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2015/05/origino-de-esperantaj-vortoj.html?view=flipcard>**





### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

### LA ONKLO KAJ LA ONKLINO

Sinjoro Muso havas fraton.

Lia nomo estas Alberto.

Li estas la onklo de Roĝero, Ŝila kaj Johano.

Onklo Alberto havas edzinon.

La edzino de la onklo estas la onklino de la infanoj.

La nomo de la edzino estas Viktorino.

\* \* \*

lun tagon la onklo kaj la onklino, kun siaj du infanoj, venis al la domo de Sinjoro Muso, por trinki teon. (La onklo kaj la onklino estas ankaŭ musoj.)

La onklo portis ĉapon kaj koltukon. Lia ĉapo estis griza, sed la koltuko estis ruĝa kun bluaj makuloj.

La onklino portis bluan robon kaj grizan kufon.

"Bonan tagon," diris Sinjoro Muso al sia frato.

"Bonan tagon," diris Onklo Alberto.

"Bonan tagon," diris la onklo kaj la onklino al la infanoj.

"Bonan tagon, ge-onkloj,"<sup>1</sup> respondis la tri infanoj.

"Vidu, miaj iinfanoj," diris la onklino, "mi havas donacojn por vi."

Onklino Viktorino havas grandan pakaĵon en la maldekstra mano!

La pakaĵo estis granda kaj peza.

La ŝnuro ĉirkaŭ la pakaĵo esis dika kaj forta.

"Portu al mi tranĉilon,"<sup>2</sup> diris Onklino Viktorino.

Johano kuris rapide en la domon kaj al-portis tranĉilon.

Onklino Viktorino tranĉis la ŝnuron de la pakaĵo per la tranĉilo.

Tiam ŝi malfermis la pakaĵon.

Ho! Ho! Ho! Rigardu!

Estis silka robo por Ŝila!

Estis flava ĉapelo por la patrino - ĉapelo kun plumoj!

Estis pipo por la patro, kiu multe fumas.

Estis granda ruĝa libro por Roĝero, kiu multe legas.

Estis skatolo da kolor-il-oj por Johano, kun du penikoj!

Ho, la bonkoraj ge-onkloj!

Ĉiu infano kisis la onklon ka la onklinon.

"Kiu faris la silkon de mia bela robo?" demandis Ŝila.

"Vermoj faris ĝin," respondis la onklo.

"Unu, aŭ du vermoj?" demandis Ŝila.

"Ho, multaj, multaj vermoj," respondis la onklo.

"Mi multe ŝatas mian silkan robon," diris Ŝila.

"Mi multe ŝatas mian libron. Mi leg-os ĝin," diris Roĝero.

"Mi multe ŝatas mian skatolon da kolor-il-oj, kaj miajn du penikojn," diris Johano.

Jam la patro fumas sian pipon, kaj la patrino portas sian novan ĉapelon!

Je la kvara horo Sinjorino Muso faris la teon kaj tranĉis la buterpanon.

Estis varma tago, do la naŭ musoj povis trinki teon en la ĝardeno, sub la kverkoj.

Sinjoro Muso ne havis pli ol kvin seĝojn, do la kvin infanoj devis sidi sur la herbo. Sinjorino

Muso metis la kukon sur la kvinan seĝon, ĉar la ronda tablo ne estis tre granda.

Sed la infanoj povis nek manĝi nek trinki. Ili tro deziris ludi per siaj novaj ludiloj. Roĝero

deziris legi la novan libron, Johano deziris pentri, kaj Ŝila deziris sur-meti la novan robon.

Sinjorino Muso donis al ĉiu infano grandan pecon da kuko, dirante, "Iru, do, ludu en la domo!"

Tiam la kvar maljunaj musoj povis trinki sian teon trankvile.

\* \* \*

Post du-on-a<sup>3</sup> horo, Ŝila ekkuris el la domo, plorante laŭte.

"Ho, Panjo, venu! Venu tuj! Johano estas tre malsana. Ho, mi timas ke li mortos!"

La gepatroj kaj la geonkloj kuris rapide en la domon.

Jes, Johano estas vere malsana!

Li manĝis la kolorilojn!!

"Ho, Roĝero, ven-ig-u la kuraciston tuj."

"Ne, mi iros," diris Onklo Alberto. "Mi kuras pli rapide ol Roĝero."

La kuracisto baldaŭ sanigis Johanon.

\* \* \*

<sup>1</sup> Onklo kaj onklino estas "ge-onkloj."

<sup>2</sup> "-il" signifas "la objekton, per kiu oni -as."

<sup>3</sup> La sufikso "on" signifas frakcion.

## Sözlük

	legos	okuyacak (fiilin mastar formu: legi=okumak)	
alporti	taşımak, getirmek	leke (burada belirsiz desen anlamında)	
bonkora	iyi kalpli, cömert	maldekstra	sol
buterpano	yağlı ekmek (burada çörek)	maljuna	yaşlı
ĉapo	şapka (kasket)	mano	el
dekstra	sağ taraf	mortos	ölecek (gelecek zaman) (fiilin mastar şekli: morti=ölmek)
deziris	arzu etti (fiilin mastar formu: deziri=arzu etmek)		çok fazla şekilde (zarf)
dika	kalın	multe	yeni
donaco	hediye	nova	teyze, hala
duona	yarım (sıfat)	onklino	dayı, amca
forta	güçlü	onklo	paket
frakcio	kesir	pak-aĵo	ağır
geonkloj	dayı-teyze ya da amca-hala, iki cins birden	peza	ağlayarak (ortaç zarf)
jam	şimdiden (ingilizcede: already)	plorante	taşı (emir, fiilin mastar formu: porti=taşımak)
kisis	öptü (fiilin mastar şekli: kisi=öpmek)	portu	sıhhatine kavuşturdu (fiilin mastar formu sanigi=tedavi etmek)
koltuko	kravat	sanigis	
kuko	kek		





silka	ipekten olan	tranĉis	kesti (filin mastar ŝekli: tranĉi=kesmek)
ŝnuro	ip	trankvile	sakinlikle (zarf, trankvila=sakin)
sufikso	ek, kelime eki	vermo	kurt, tırtıl (burada ipek böceğinden bahsediliyor)
timas	korkuyor (filin mastar formu: timi=korkmak)		
tranĉilo	bıçak (-il eki alet anlamını verir, tranĉi=kesmek -> tranĉilo=kesici alet, bıçak)		

#### Ekler:

-aĵo	bir kökten fiziksel obje yaratır (paki -> pakaĵo = paketlemek -> paket)
-il	bir kökten alet yaratır (tranĉi -> tranĉilo = kesmek -> bıçak)
-ant	bir fiilden aktif ortaç yaratır (trinki -> trinkanta = içmek -> içen) (isim, sıfat, zarf formlarında olabilir)
-at	bir fiilden pasif ortaç yaratır (trinki -> trinkata = içmek -> içilen) (isim, sıfat, zarf formlarında olabilir)

## Kapaniŝ



Bu 12. sayımız ile bir seneyi tamamlamış, 2016 yılını kapatmış bulunuyoruz. Bu da Türkiye Esperanto hareketi için bir başarı sayılabilir. Son zamanlarda yurtdışından abone olma istekleri de çoğaldı. Şu anda toplam olarak 165 abonemiz var ve bunların 35'i yabancı.

Kasım ayındaki bir başarı daha ise ciddi anlamda Türkiye Esperanto hareketinden ilk sayılacak bir kitabın yayınlanması ve dünya piyasasına çıkması oldu. Bu Nisan ayı başında Kapadokya Ürgüp'te gerçekleştirdiğimiz 9. Ortadoğu Toplantısının ana teması olarak seçip yola çıktığımız Nazım Hikmet ve Şiirleri düşüncesi, 60 şiirlik Türkçe Esperanto çift dilli bir kitap haline dönüştü. Değerli esperantistler İtalyan dilbilim profesörü ve eski UEA başkanı Renato Corsetti ile Japon'yadan Hirotaka Masaaki (Vastalto) olmasaydı bunu gerçekleştirmek mümkün olmayacaktı.

Kitap aynı zamanda UEA'nı orienteo-okcidento özel serisinin 51. kitabı olarak yayımlandı. Kitap başında UEA başkanı Mark Fettes'in başyazısı, ve Prof. Gündüz Vassaf ile Türkiye Pen Derneğinin başkan yrd. Halil İbrahim Özcan'ın önzözleri ile yayımlandı.

Kitabın ilk satış yeri olan Amazon.com sayfası için buraya: [Amazon.com](https://www.amazon.com) UEA'nın katalogundaki satış sayfası için ise buraya [Katalogo.UEA.org](https://www.katalogo.uea.org) tıklayın.

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 51

Sub aŭspicioj de UEA  
en Konsulta Partnereco kun Unesko

Nazım Hikmet Ran



Poezia antologio

El la turka tradukis Vasil Kadifeli

Mondial

Sonraki sayımızda buluşmak üzere...

Preskaŭ la tuta septembra numero de Esperanto revuo estas dedicita al la 101-a UK en Nitra. Membrigo al UEA per nur 5€ kaj ricevu 11 numerojn de la revuo rete en pdf formato dum jaro. <http://uea.org/alighoj>



Solvo de la kruĉvort-enigmo

1	M	E	L	O	N	G	E	N	O	12
2	O	L	I	V	A	R	B	O	11	
3	N	A	N	O	Z	O	10			
4	O	M	O	Z	O	9				
5	L	O	L	O	I	8				
6	O	N	I	L	O	7				
7	G	E	O	I	D	O	6			
8	O	N	O	K	E	N	5			
9	K	A	R	P	O	4				
10	R	E	L	A	T	3				
11	A	T	E	P	O	2				
12	D	I	O	F	O	1				